# ATEISMO

ESPERANTO

## Organo de ATEO

# ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO

januaro - septembro 1991

vol. 3, n-roj 1-3 (7-9)

eldonata trifoje jare

# ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO (ATEO)

Fondita en 1987 de S-ro Ralph Dumain kaj S-ino Minerva Massen

Neneŭtrala faka asocio kunlaboranta kun UEA

**Organo:**

*Ateismo* aperas po 3 fojoj jare, en januaro, majo, kaj septembro

**Membrokotizo aŭ Abonkotizo:** 12 usonaj dolaroj ($12) (pagenda al "A.T.E.O.": sendu al R. Dumain); aŭ 25 gld. (pagu al UEA-konto ATEO-Y). Por detaloj vidu la internan dorskovrilon.

## LA ESTRARO DE ATEO

**Prezidanto, Redaktoro:** S-ro Ralph Dumain; 1629 Columbia Road, N.W., Apt. 615; WASHINGTON, D.C. 20009-3651; Usono. ☎ (202) 332-0589.

**Vicprezidanto:** S-ro Martin Lavallée; P.O. Box 126; Succursale Beaubien; MONTRÉAL, QC H2G 3C8; Kanado. ☎ (514) 525-2002.

**Sekretario-Kasisto:** S-ro Cleve (Klivo) Lendon; 920 Dynes Road, #57; OTTAWA, Ontario K2C 0G8; Kanado. ☎ (613) 228-1378.

**Kongreso-Estrarano:** S-ro Peter A. Danning; G/F, 68 Church Road; RICHMOND, SY - TW10 6LN; Britio. ☎ (081) 948 2256.

## Korespondado, Informpetoj, kaj Manuskriptoj

Pri informpetoj aŭ abonproblemoj kontaktu la Vicprezidanton. Reagleterojn, komentojn kaj informojn, kaj manuskriptojn sendu al la Prezidanto/Redaktoro aŭ Vicprezidanto. Se vi skribas permane, bonvolu skribi klare, aparte vian nomon kaj adreson. Se vi anticipas ian ĝenon aŭ persekuton pro ateisma agado, bonvolu mencii bezonatajn specialajn aranĝojn.

## PERANTOJ DE *ATEISMO*

Ĉeĥoslovakio: Prof-o L. Podmele; Počernická 86; 108 00 PRAHA 10

**Francio:** Esperantista Federacio de Laboro (F.E.T.); 115 Rue Béranger; 92320 CHATILLON

**Hispanio:** S-ro Luis Serrano Perez; Font Nova 32; E-08202 SABADELL (Barcelona)

**Kanado:** S-ro Cleve (Klivo) Lendon; 920 Dynes Road, #57; OTTAWA, Ontario K2C 0G8

**Pollando:** Ireneusz M. Smolewski; P.O. Box 3; 25-517 KIELCE 15

# MESAĜO DE LA PREZIDANTO

## SALUTO KAJ PARDONPETO

Vi delonge atendis novan numeron de nia revuo *Ateismo*. La laste eldonita numero estas vol. 2, n-ro 3 (6), septembro 1990 [laŭ nia cit-stilo: 2:3 (6)], kiu fakte estis presita kaj elsendita en decembro 1990. Ĝi estis la unua numero produktita perkomputile sole de mi, kaj ĝi ricevis favorajn komentojn. 260 ekzempleroj estis produktitaj, el kiuj multe pli ol 200 estis elsenditaj, al abonantoj kaj al Esperantistaj gazetoj kaj bibliotekoj. Post tiam, ni gajnis multajn novajn abonantojn.

La pasinta jaro estis por mi tre malfacila, kaj okupadis min multaj aferoj, speciale pluraj personaj bataloj, ekz. kontraŭ la posedanto de mia apartamenta konstruaĵo, kontraŭ stultaj urb-registaraj burokratoj, ktp. ATEO daŭris progresi, kvankam vi ne sciis tion, kio okazis, pro mia longa prokrasto. Mi honte pardonpetas, kaj mi esperas ke tamen vi daŭros subteni nian unikan kaj socie utilan entreprenon. Ekscita estonteco atendas nin!

Pro la longa prokrasto, mia solvo estas jene eldoni trioblan numeron por la tuta jaro samtempe, kiu ampleksas 60 paĝojn, t.e. trioble la kutima 20-paĝa numero. Do, vi ja ricevas la saman jaran kvanton kiel kutime. Mi esperas, ke vi ĝuos ĉi tiun enhavon kaj estime aprezos ĝian elstaran diversecon kaj informivon, pri kio ni rajtas fieri, kompare al iu ajn nacilingva niafaka revuo.

## ESTONTA ELDONADO

Responde al pasintaj petoj aŭ proprainiciate, kelkaj volontuloj anoncis sian pretecon helpi pri presado (eĉ perkomputile) kaj dissendado de nia revuo. Mia originala intenco estis konservi por mi la ĉefan postenon de eldonado kaj distribui tiun respondecon al kelkaj aliaj volontuloj en la mondo. Ekz., mi povus produkti la originalan tekston kaj doni ĝin al kelkaj perantoj por multobligado kaj dissendado. Mi eĉ povus sendi la enkomputiligitan prespretan tekston al volontuloj kiuj havas pro-

prajn komputilojn kaj ili povus mem presi kaj poste multobligi kaj dissendi ĝin. Per tia distribuata eldonado mi esperus ŝpari monon, speciale en nepovipaga orienta Eŭropo. Ideale, ĉiu eldonhelpanto pritraktu tuton aŭ parton de orienta Europo, de okcidenta Eŭropo, de Nordameriko, aŭ minimume propran landon. Oni decidus ankaŭ, kiuj respondeculoj prizorgu Latinamerikon, orientan Azion, kaj la Mezorienton. Kongrue al la originala intenco, mi preferadis homojn kun IBM-kongruaj mikrokomputiloj.

Mi ricevis kelkajn proponojn el Pollando, Litovio, Germanio, Israelo, kaj Kanado. Almenaŭ unu eblaĵo el tiu listo ne plu aktualas. Mi ankoraŭ ne finsolvis la situacion. Por garantii eviton de estontaj embarasaj prokrastoj, mi volas tute liberiĝi el la tasko de eldonado. Eventuale, se *Ateismo* falus en fidindajn manojn, mi pretus cedi la postenon de ĉefredaktoro. Ĉiuokaze, mi garantias la daŭrigon kaj pluvivadon de *Ateismo*.

Mi ricevis kelkajn sugestojn dankon al Peter Danning pri la redaktado kaj eldonado de la revuo. (Vidu lian kongresraporton kaj mian postkomenton ĉi-numere.) Ni bonvenige akceptas lian sugeston ke ni aranĝu ke estu almenaŭ du redaktoroj kiuj respondecus pri diversaj fakoj/temoj de la revuo. Do, mi devas trovi kunredaktoron. Akcepto de sugestoj pri eldonado, ekz. ofteco de la revuo, dependas precipe de nia financa stato, kaj ankaŭ de nia eventuala stabo.

Mi ĵuse raportas, ke ni havas provizoran solvon de la situacio. Nia vicprezidanto S-ro Lavallée lastatempe volontis helpi min pri la eldonado, kaj pro la proksimo de Kanado al Usono, mi decidis akcepti lian proponon. Minimume li helpos min pri perkomputila preparado de la revuo ĝis presado de la ĉefkopio por posta multobligado. Tia valorega helpo solvos la ĉefan kaŭzon de mia prokrastemo.

NIA ORGANIZA ESTONTECO

Ne konvenas, ke la organiza laboro de ATEO plu dependu de miaj personaj cirkonstancoj, do mi volas laŭgrade liberiĝi el diversaj organizaj responde-

oj. Mi opinias, ke helpus nian reputacion kaj agadon se mi demisius kiel prezidanto kaj iĝu por tempo vicprezidanto aŭ alia estrarano (kaj kompreneble restu redaktoro). Tiukaze ni bezonus novan prezidanton kiu jam havas taŭgan sperton je organizaj aferoj de ATEO. Ekz., mi varme rekomendus elekton de nia vicprezidanto Martin Lavallée kiel prezidanton, se li akceptus la postenon. Cetere, mi bonvenigas S-ron Peter Danning kiel nova estrarano por kongresoj.

FINANCA STATO

Niaj financoj troviĝas ĉe tri lokoj: konto ATEO-Y ĉe UEA (Roterdamo), UEA-konto ĉe Vaŝingtono kiun mi prizorgas, kaj ĉe niaj diversaj perantoj, kiuj kolektas kaj tenas monon kaj eventuale transdonas ĝin al Vaŝingtono aŭ Roterdamo. Mi uzas la Vaŝingtonan konton por eldonado de ***Ateismo***. Nia nova kasisto Cleve Lendon komencas prizorgi la parton de niaj financoj kiuj rilatas al UEA. Plena financa raporto ankoraŭ ne haveblas. Ni esperas eventuale publikigi raporton en ***Ateismo*** por via trastudo. Necesas elspezoj krom nia revuo, ekz. por UEA.

Notu ankaŭ ke kelkaj homoj en nepagipovaj landoj jam helpis per sendo de Esperanto-libroj al mi, kiujn mi revendas por enkasigi iometan monon al ATEO. Ni instigas pluajn tiajn donacojn.

Vi povas helpi ankaŭ per varbado por ATEO, ekz. en kunvenoj kaj gazetoj. Ni dankas S-ron Luis Serrano Perez kiu pagis el propra poŝo reklamon por ATEO en gazeto ***Heroldo de Esperanto***.

La financa problemo ankoraŭ gravas. Ni ne enspezas sufiĉan monon per kotizoj po $8 US (16 gld.) por eldoni la revuon. Mi havas monon por eldoni kelkajn pluajn numerojn de ***Ateismo*** dankon al kelkaj grandaj mondonacoj ricevitaj komence de 1991. Memoru, ke niaj veteranaj eks-estraranoj Ges-roj Massen ne plu financas la revuon. Presado de unu numero kostas iomete pli ol $200 US, kaj aldoniĝas la poŝtkostoj, kiuj en Usono altiĝis depost la lasta numero.

La ĉeestintaro ĉe la ATEO-kunsido en Kubo en 1990 per voĉdono rifuzis mian peton altigi la abon-kotizon. En mia raporto al la ĉi-jara kunsido ĉe la Universala Kongreso, mi denove petis. Tie oni konsentis, sen fiksi sumon, ke mi rajtas altigi la kotizon laŭnecese.

Jen konsilo pri pago. Se vi devas sendi vian kotizon al UEA, estas pli bone rekte pagi al nia konto ATEO-Y. Kelkaj abonas ***Ateismon*** pere de la abonservo de UEA, sed tio komplikigas la aferon ĉar UEA debetas por si mem 20% de la pago. Oni devas singarde zorgi ankaŭ pri bankokostoj en Nederlando kaj metodo de transpago. Mi ŝarĝis S-ron Lendon kun la tasko konstati ĝuste la situacion. Se estas vere, ke oni deprenas 11 gld. por ĉiu banka enkasigo el eksterlando, tio detruas nian tutan sistemon. Se individuo sendos 16 gld. kaj la banko forprenos 11 gld., preskaŭ la tuta sumo estos malŝparo. Prefere, sendu vian kotizon al via landa peranto se vi havas, kaj tiu povos kolekti multajn kotizojn kaj poste zorgi pri transdono de la mono. Plej bone, sendu ian bankĉekon rekte al mi (R. Dumain) sed **nur** je valuto de usonaj dolaroj. (Valuta konvertigo ne fareblas.)

NOVA KOTIZO

Mi decidis altigi la kotizon por 1992 al $12 US, aŭ 25 gld al Nederlando. Por usonanoj tiu sumo por aniĝo kaj gazetabono estas tre tre malmultkosta. Mi esperas ke niaj okcidenteŭropaj amikoj sentos nenian ĝenon. Mi emfazas ke, se vi ne havas la monon, vi rajtas denove pagi la ĝisnunan kotizon de $8 US aŭ 16 gld. Mi ankaŭ rememorigas, ke ni akceptas ĉiujn nepagipovulojn. Tiuj kiuj jam pagis por 1992 ne maltrankviliĝu.

PRI LA FORMATO DE LA REVUO

Ni ricevis favorajn reagojn de ĉiuj pri la formato de la lasta numero. Per la komputila softvaro kiun mi nuntempe uzas, kiu ankaŭ havas kelkajn difektetojn, tre malfacilas kaj malrapidas produkti du-kolumnan tekston. Krom eble kelkajn rubrikojn, mi de nun eldonas unu-kolumnan tekston, kiu legiĝos

plaĉe kaj glate, mi esperas, kaj ŝparos al mi multan tempon kaj ĝenon.

PRI LA LORULOT-MANUSKRIPTO

Mi ricevis diversajn konsilojn pri eventuala dispono de la manuskripto de verko menciita en la antaŭa numero: ***Ĉu Oni Povas Vivi sen Religio?*** de André Lorulot, tradukita el la franca de Martin Lavallée. Kelkaj favoras apartan eldonon kiel libron, aliaj ne. Mi ankoraŭ ne decidis kion fari, sed mi konsideros publikigi ĝin tute aŭ parte kiel venonta numero de ***Ateismo***.

RILATOJ KUN UEA

Pasintjare (1990) ATEO estis akceptita kiel kunlaboranta neneŭtrala faka asocio, sed UEA dum pluraj postaj monatoj ne ĉesis sian nekompetentan kaj prokrasteman stilon en pritrakto de niaj aferoj. La Centra Oficejo ne respondis telefaksojn kaj leterojn ĝis post forpaso de pluraj monatoj, se entute oni ja respondis. Dum la kelkjara fuŝado antaŭ ol UEA finfine akceptis ATEOn, mi subskribis du kontraktojn por UEA, sed evidente oni perdis ilin, ĉar UEA ankaŭ ĉi-jare (1991) sendis denove samspecan kontrakton por subskribo. Tia prokrastemo kostis al ni monon. Kiel kunlaboranta asocio ni rajtas je senpaga kunvencambro ĉe Universala Kongreso, sed dankon al du-tri-jara fuŝado de UEA antaŭ ol pritrakto de nia aliĝpeto, ni devis pagi por kongresaj ĉambroj.

Tamen la agadmaniero de UEA finfine pliboniĝis. Mi finfine ricevis detalajn respondojn al antaŭaj demandoj. Kiel kutime, ni de tempo al tempo ricevas informojn pri la stato de nia konto.

La ĉefa restanta problemo temas pri la Universalaj Kongresoj. La estraro de ATEO neniam ricevas ian antaŭanoncon pri la dato, horo, kaj ĉambro de la ATEO-kunsido, do la afero restas tuta mistero ĝis alveno ĉe la Universala Kongreso de iu nia reprezentanto.

ESTONTA AGADO

Ni intencas firmigi la mastrumadon de ATEO kaj *Ateismo*. Niaj membroj devus partopreni ne nur en la Universala Kongreso, sed plani programojn en pluraj aliaj esperantistaj kongresoj, kiel faris niaj estimindaj kolegoj ekz. en Germanio kaj Pollando. Ni devas verki bazan informfolion pri ATEO por interesotoj. De tempo al tempo ni reklamu kaj raportu en gazetoj.

Ŝajnas ke estas bedaŭrinda limo de la numero de esperantistoj kiuj subtenos intelektajn kaj kulturajn aferojn en Esperanto. Kelkaj jam plendis publike ke nur maksimume cent Esperantistoj pretas aĉeti beletrajn librojn en Esperanto. Eĉ se tio estas subtakso, tamen evidentas ke tro malgranda merkato bremsas la evoluon de utiligo de Esperanto por seriozaj, estimindaj celoj. Ni devas honeste konsideri tiun malforton kaj ankaŭ la kvanton de frenezeco, filistreco, diletantismo, banaleco, mistifikemo kaj religieco en Esperantujo. Mi divenas, ke nia merkato estus maksimume kelkcent homoj. Ni strebu atingi almenaŭ tiom.

Sed same grave, vi povos komenci interagi unu kun la alia sendepende de ĉi tiu revuo kaj la centra agado de ATEO. Vidu la Internacian Adresaron en ĉi tiu numero. Ni publikigis la nomojn kaj adresojn nur de tiuj kiuj donis permeson, do temas pri malgranda procento de nia abonantaro. Bonvolu informi min se vi volas aldoniĝi al la listo. Ni publikigos suplementon al la adresaro dum 1992.

Pro ke la promesita Landa Listo estus aparta enmetitaĵo kaj pro la jama longega prokrasto de ĉi tiu numero, disdono de la Landaj Listoj devos atendi ĝis la venonta numero. Do, se vi ne jam faris, informu min ankaŭ se vi volas aldoniĝi al vialanda Landa Listo.

De tempo al tempo ATEO ricevas petojn pri korespondado, kelkfoje sed ne ĉiufoje kun ateistoj. Estus nun praktike neeble retrovi jamajn tiajn petojn, sed ni volonte publikigos (senpage, komprenedeble) en aparta rubriko ĉiujn petojn por korespond-

ado *kun aliaj ateistoj/liberpensuloj.* Do, ĉu vi jes aŭ ne jam tiel faris, se vi serĉas korespondanto(j)n, sendu reklamon al mi por publikigo. Atentu, ke ne ĉiuj abonantoj troviĝas en la Internacia Adresaro.

Ni ĉiam bezonas aldonajn landajn perantojn. Referencu la aktualan liston sur la kovrilo(j).

Post stabiligo kaj firmigo de propra situacio, ni povos serioze plani pri eksteraj rilatoj. Ni ne povas konkurenci kontraŭ la angla aŭ vivi en memkontenta vakuo pretendante uzi la estontan universalan lingvon, sed eble ni povas kontribui al la progreso de la ateisma/humanisma movado tutmonde per rilatigo de niaj scioj kaj klopodoj al diversaj nacilingvaj enlandaj kaj internaciaj organizoj. Nepre legu mian raporton "ATEO Renkontas IHEU". Nu, ni povas komenci per revado.

## RAPORTOJ PRI LA UNIVERSALA KONGRESO EN NORVEGIO

### RAPORTO DE CVI ŜOLT (ISRAELO)

Dum la komenco kaj dum la fino de la kunveno partoprenis 30 samideanoj, kaj eĉ ĉirkaŭ 40 dum la mezo. Post la tre malagrabla atendo por iu, kiu malfermus la kunvenon, mi laŭtlegis la raporton de S-ro Dumain, kaj S-ro Peter Danning ekgvidis la kunsidon. La neformala diskuto pri ateismo ĝenerale, pri la situacio en diversaj landoj, kaj pri la bezono de Esperantista ateista organizo estis laŭ mia opinio bona. La decidoj de la kunveno -- se ni povas nomi ilin decidoj -- estis nur:

(1) reelekti la estraron kun la aldono de S-ro Danning;

(2) lasi la decidon pri la plialtigo de la kotizoj al la estraro, kaj same pri la eblaj malsamaj kotizoj por diversaj landoj;

(3) preferi la oftan kaj precizan aperon de la revuo, minimume kvarfoje po jaro, eĉ se ĝi estos malpli granda.

# RAPORTO DE PETER DANNING (BRITIO)

Jam je alveno ĉe la kongreso, kongresanoj trovis inter siaj dokumentoj broŝuron en Esperanto de Internacia Humanisma kaj Etika Unuiĝo (IHEU).

DIMANĈON, la 28-an de julio 1991, de horo 13:00 ĝis 15:00, okazis la ATEO-kunveno en Salono Baghy. Oni atendis la alvenon de iu kiu prezidus kaj gvidus. Post ioma tempo mi proponis min kiel gvidanton. Sin anoncis S-ro Cvi Ŝolt, kiu laŭ mia peto komencis voĉlegi raporton de S-ro Dumain. Tio estiĝis tre teda, ĉar tiu komunikaĵo tute ne taŭgas por voĉlegado. Iuj foriris. Do ni petis ke li resume trakribru la gravajn punktojn.

Ni cirkulis paperon por listigi partoprenantojn. Nur 16 subskribis, tamen ĉeestis pli multaj. Partoprenis pluraj ne-membroj, eĉ ne-ateistoj, kiuj deziris informiĝi pri la konceptoj de senreligia etiko kaj volis scii pri niaj pensoj. Mi do anoncis, ke ĝis 14:30 ni neformale diskutu la konceptojn de ateistoj kaj rezervu la lastajn 30 minutojn al organizaj aferoj de ATEO. La neformala diskuto estis, miaopinie, valora interŝanĝo de diversaj ideoj kaj prioritatoj.

Nesciante la situacion de estaranoj, kiuj mankis ĉi-kunvene, ni unuanime reelektis la nunajn estraranojn. Mi proponis ke estraro ne konsistu nur el viroj sed neniu ino pretis kunlabori. Oni proponis min, kaj mi akceptis kun kondiĉo, ke mi surprenu respondecon nur pri dumkongresa agado, pro jama okupateco en pluraj organizoj.

La ĝenerala sinteno pri la revuo ***Ateismo*** estis, ke ĝi estas bona, sed ke ĝi aperu akurate, minimume kvarfoje po jaro, prefere sesfoje. En Irano kaj eble en aliaj frenez-religiaj-diktaturaj landoj, oni timas ricevi tian gazeton. Mi menciis la sistemon de ***Forumo***, t.e. maksimume 12 paĝoj A5-formataj, ĉar tian aĵon oni povas faldi al A6 kaj sendi en C6 koverto; tio aspektas kiel letero kaj pezas nur 20 gramojn.

Pri kotizoj, ni decidis ne decidi arbitre, sed proponis ke la estraro kalkulu la sumon bezonatan por kovri pres- kaj send-kostojn plus iom por sekretaria afrankado, anoncando, filiigo ĉe UEA, ktp. Mi proponis, ke la kotizo por pagipovaj landoj estu sufiĉe alta, por ke ATEO povu akcepti ĝis 25% da nepagantaj anoj el nepagipovaj landoj, sed la generala sinteno estis forte kontraŭa. Tamen la plejmulto subtenus duontarifon por anoj en landoj kun transpagaj problemoj.

Iu proponis ke oni trovu perantojn en diversaj landoj kiuj kolektu kotizojn kaj dissendu *Ateismon* enlande. Mi menciis la malfacilaĵon: sendo de kvanto de ekzempleroj al unu peranto ŝparus malmultan monon. Ankaŭ, oni devus absolute fidi pri ĉiu peranto. Ĝi do restas propono por la konsidero de la estraro.

La kunveno finiĝis sen definitivaj decidoj, krom lasi decidojn al la estraro. Krom ĝeno pro la manko de organizo, la etoso je la fino estis sufiĉe agrabla.

LUNDON, la 29-an de julio, de horo 10:45 ĝis 12:15, okazis en Salono Venture kunveno de ASISTI: Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj. (Vidu la *Jarlibron de UEA* por informoj pri ĉi tiu faka asocio.) Mi partoprenis el scivolemo. ASISTI havas nenian propran starpunkton, sed celas ke homoj lernu, komprenu, toleru diversajn religiajn konceptojn. Ĝi certe bonvenigus la kunlaboron de ateistoj.

VENDREDON, la 2-an de aŭgusto, de horo 16:45 ĝis 17:45, okazis en Salono Baghy kunveo de IRKE: Inter-Religia Kunveno Esperantista. Mi ne ceestis, ĉar mi ne sciis pri invito al ATEO.

Restas malklare al mi la ekzistokialo kaj de ASISTI kaj de IRKE. Oni ne menciis fontojn de la monrimedoj de ASISTI.

Jen kelkaj sugestoj kiujn mi elpensis dum la kongreso kaj postkongreso. Ĉu en vizitata urbo aŭ ĉirkaŭaĵo ekzistas ano(j) de ATEO, kiu(j)n oni

povus kontakti? Ĉu kongresantaj reprezentantoj de ATEO celu ne nur kontaktojn kun interesataj kongresanoj sed kun lokaj neesperantistaj humanistoj kaj ateistoj? Utila estus reto da gastigantoj, simila al la Pasporta Servo, kiuj pretus gastigi vojaĝantajn ĉi-kaze ateistajn kaj humanistajn Esperantistojn.

POSTKOMENTO DE RALPH DUMAIN

Mi kore dankas S-rojn Danning kaj Ŝolt pro ilia improviziita gvidado de la ATEO-kunsido kaj pardonpetas al ili kaj al ĉiuj pro la ĝenoj kiujn mi respondecas. Mi klarigu, ke neniu estrarano (ĉiuj estas Nordamerikanoj) povis partopreni la Universalan Kongreson (UK), do mi enpoŝtigis raporton kaj helpopeton al kelkaj ATEO-anoj kiuj certe aŭ eble partoprenus la UK. Tiel mi provis kontakti S-rojn Danning kaj Ŝolt kaj kelkajn aliajn membrojn. Bedaŭrinde, mi ne enpoŝtigis la aferojn sufiĉe frue por ke ili atingu la koncernajn homojn antau ol foriro al la kongreso; sed, enkalkulante tian eventualon, mi sendis ankaŭ la saman aferon al la Loka Kongresa Komitato en Bergen kun peto transdoni ĝin al S-ro Ŝolt.

La enhavo de mia raporto plejparte troviĝas en mia mesaĝo komence de ĉi tiu numero. Mi aldonu, ke ATEO ricevis inviton partopreni en la Inter-Religia Kunveno Esperantista (IRKE). Mi antaŭe decidis, ke ATEO mem ne oficiale partoprenus ĉi tiun kunvenon, ĉar temas pri porreligia afero kontraŭ la celoj de ATEO, kiu cetere komenciĝus tendence per religia meditado kaj deklamoj el diversaj sanktaj skribaĵoj. Mi ricevis bultenon de ASISTI, en kiu menciiĝas ies deziro ke ATEO partoprenu. Partopreno niaflanka dependas, ĉu troveblas en la ASISTI-rondo homoj kiuj bonvenigus kontraŭ-religiajn informojn kaj konceptojn. ATEO celas nek amikiĝi kun religiuloj nek konverti ilin al nia perspektivo.

Mia intenco estis ke la ĉefa celo de ĉi tiu kunsido ne estu organizaj aferoj sed neformala komuna diskutado de religiaj, ateismaj, kaj humanismaj aferoj, do mi feliĉas, ke tio ja okazis.

Mi respondu iomete al diversaj proponoj. ATEO ne diskriminacias laŭ sekso aŭ alia kriterio, kaj ni bonvenigas -- tre bezonas! -- novulojn en nian estraron kaj ceterajn kunlaborontojn, ĉu inojn ĉu ne. Sed interesatoj devas sin proponi. Mi havas nek tempon nek rimedon nek devon serĉi inojn por la estraro por plaĉi al ies sento de politika korekteco.

Mi devas ja altigi la abonkotizon. Ni petegas ĉiujn pagi abonon se eblas, sed ni devas akcepti tiujn kiuj ne povas pagi eĉ duontarifon. Bonvolu pagi plene tiom kiom vi povas, aŭ sendu Esperantajn librojn por revendo se mono ne eblas.

Oni ja rajtas postuli ke *Ateismo* aperu akurate. Mi ne povas nun akcepti sugeston, ke la revuo aperu minimume kvarfoje po jaro. La fina decida faktoro estas la kosto. Eĉ se pli malgranda gazeto kompensus plioftigon de apero (mi dubas eĉ tion), restus la altaj poŝtkostoj, almenaŭ en Usono. Ŝanĝo de fizika formato tiucele aŭ alicele estas konsiderinda. Estas ankaŭ la libera tempo je mia dispono. Estas jam malfacile produkti revuon trifoje dum jaro. Se mi sukcesos liberiĝi kaj de eldonaj kaj de redaktaj taskoj, eble miaj sekvontoj povus eldoni pli oftan revuon, sed finfine decidigos nia financa stato kaj la kostoj en la lando de eldono/disdono.

Mi dankas pri ĉi-rilataj kaj ceteraj sugestoj. Mi klopodos efektivigi la lastajn sugestojn de S-ro Danning. Ankaŭ, mi bonvenigas lin en la estraron.

## KUNVENO PRI ATEISMO DUM LA 69-A GERMANA ESPERANTO-KONGRESO EN MUNKENO

de Roland Schnell (Germanio)

Fulmo ne venis el la ĉielo kaj forbrulis la impertinentulojn kiuj aŭdacis kunveni en la katolika domo *Kolping* sub la bildo de krucumita kristo kaj paroli pri ateismo. Unuafoje okazis en la kadro de Germana Esperanto-Kongreso en Munkeno malgranda

kunveno pri ateismo, kiu celis esti modesta kompenso al la tradicia di-servo kiu estas konstanta kaj ne plu kritikebla ero de ĉiu kongreso.

Nur pro la anonco de la kunveno en la kongresprogramo multaj venis kaj konfesis, ke ili sin komprenas kiel ateistoj sed ĝis nun ne sciis pri la ekzisto de ATEO kaj revuo ***Ateismo***. La kunsidon ili tamen ne povis partopreni, ĉar okazis ĉiam diversaj kunsidoj samtempe.

En la kunsido partoprenis kvin personoj, el kiuj almenaŭ unu venis por diskuti pri la (ne)ekzisto de dio. Tamen la kunveno ne celis filozofian diskuton sed intencis informi pri la agado kaj celoj de ATEO kaj respondi demandojn. Pro la fakto, ke unu partoprenanto venis el Hindio kaj ĉar li okupiĝas kaj verkas pri jogo, ekestis interesa diskuto pri la rolo de religio kaj la signifo de ateismo en diversaj kulturoj.

Supozeble estas neeviteble, ke certaj kristanoj klopodas moki ateistojn aŭ provas konvinki ilin ke ili tamen kredas je iu dio, kiel pruvas ilia nomo "sendiuloj". ATEO siaflanke ne havas misian taskon rilate al kredantoj de iu ajn religio. La celo estas trovi kaj ligi la ateistojn inter la Esperantistoj kaj stimuli diskutadon kaj interŝanĝadon de opinioj kaj spertoj. Nun ni scias, ke ankaŭ en Germanio ili ekzistas pli multnombre ol supozite.

## ATEO RENKONTAS IHEU

raportas Ralph Dumain

Je la 30-a de julio mi ĉeestis kunvenon de la asocio Vaŝington-Areaj Sekularaj Humanistoj (Washington Area Secular Humanists = WASH = "LAVI"), ĉe kiu gastprelegis D-ro Rob Tielman, prezidanto de la Internacia Humanista kaj Etikista Unio (IHEU) en Nederlando. Lia temo estis homaj rajtoj kaj humanista agado ĉefe en evoluantaj landoj, t.e. la "tria mondo", en kiu teokratia fundamentismo minacas homajn rajtojn. Kelkspecajn homrajtajn problemojn traktas Amnestio Internacia, sed ne ĉiujn. Ekzemploj estas virinaj rajtoj (des pli en islamaj land-

oj), abortorajto, volonta eŭtanazio, AIDS-politiko, seksa libereco, kaj drogpolitiko.

D-ro Tielman menciis sociajn problemojn kaj humanistan agadon en diversaj landoj de la tria mondo, cetera Azio, orienta Eŭropo, eĉ okcidenta Eŭropo kaj Usono. Tiurilate Usono estas subevoluinta kompare al la plej progresintaj okcidenteŭropaj landoj. Nur lastatempe orienteŭropanoj rajtas establi sendependajn humanistajn grupojn, kaj nun ili devas konkurenci kun la katolika eklezio celante propran hegemonion. En la iberia kaj latinamerika mondo estis preskaŭ nenio dankon al la katolika eklezio, sed nun ekzistas humanistaj organizoj en Hispanio, Kostariko, kaj Meksiko. Taja kaj japana socioj estas favoraj, sed bezonatas organizado. Hindio jam havas humanistan tradicion, ekz. la Ateista Centro kaj la Raciista Centro. Lastatempe establiĝis organizo en Bangladeŝo. Agado en islamaj landoj estas danĝera. Ekzistas iom da agado en Afriko, sed pli da tutmonda atento necesas, specife kunlaboro inter lokaj organizoj en la industriigita kaj tria mondoj.

Tiu lasta aserto estas ironia, ĉar la ĉeestintoj krom mi tute ignoris Afrikon en siaj demandoj. (Liaj proponoj pri Afriko rememorigas min pri Esperantista agado por Afriko, eĉ ĝemelurboj.) Estis demandoj kaj respondoj pri la virina movado en Eŭropo, agado en Britio (laŭdire kutime tro teoria kaj ne sufiĉe praktika), kaj novaj grupoj en Sovetunio, la eksa GDR, kaj Hungario kiuj celas sendependiĝon de komunistpartiaj influoj. D-ro Tielman prediktis ke la konflikto en Latinameriko inter katolikismo kaj la nova penetranta protestanta fundamentismo helpos la humanistan movadon.

Estis kompreneble multa diskutado komparante la situacion de Usono kaj okcidenta Eŭropo, laŭ kio Usono aspektas subevoluinta kaj primitiva. Ekz., en Usono mankas adekvata sociscienca enketoj pri seksa konduto kaj pri religia kredo, sed oni devas esti singarda, ĉar ankaŭ la Katolika Eklezio ekspluatas tiajn esplorojn por propra ruza agado kaj propagandado. Mankas en Usono sufiĉaj institucioj kaj instruado por humanismo. Oni ne imitu religi-

ajn instituciojn kaj ne kreu kvazaŭ-ekleziajn instituciojn; oni prefere imitu la novajn sociajn movadojn. Humanistaj Centroj estas tre bonaj. Ec la lingvoproblemo ĉi-kaze malfavoras Usonon. Ekzistas materialo en Eŭropo por lernejoj kiu bezonas tradukon *en* la anglan lingvon.

IHEU havas broŝurojn kiuj priskribas sian novan "Human Rights and Development Program" (HR-DP) (Programo pri Homaj Rajtoj kaj Evoluigado) ĝenerale kaj en specifaj triamondaj landoj. D-ro Tielman sugestas ankaŭ ke interesatoj partoprenu la 40-an Mondkongreson de IHEU en Amsterdam, Nederlando, je la 26-a ĝis la 30-a de julio 1992. La adreso estas: International Humanist and Ethical Union; Oudkerkhof 11; 3512 GH UTRECHT; Netherlands (Nederlando).

Mi jam estis korespondinta kun D-ro Tielman pri ATEO, al kiu IHEU simpatias, do ĉi-okaze mi kaptis ŝancon prezenti min al li persone. Tute sendepende de ATEO, IHEU lastatempe eldonis broŝuron en Esperanto, kaj disdonis ĝin ĉe la ĉi-jara (1991) Universala Kongreso. D-ro Tielman menciis, ke li bonvenigas individuajn petojn por tiu broŝuro. Oni eĉ rajtas peti en Esperanto mem, kion li kapablas legi. Do eble vi volos peti ekzemplero(j)n. En ĉiu komunikaĵo, mi sugestas ke vi menciu ke vi informiĝis pri IHEU-agado per ATEO kaj R. Dumain. Ankaŭ mi rajtas mendi ekzemplerojn amase por disdono.

Se nia financa kaj organiza situacio stabiliĝos, ni eventuale povos aniĝi en IHEU, kiu ebligos promociadon de ATEO. (Ni jam delonge ricevis inviton verki artikolon pri ATEO por revuo ***International Humanist***.) La prelego de D-ro Tielman instigis cerbumadon pri ebla estonta praktika agado kun la tutmonda humanista movado ekster Esperantistaj rondoj. Eble iam ni povos kunlabori kun diversaj nacilingvaj liberpensulaj/humanistaj grupoj cele al fortigo de la movado tutmonde kaj en specifaj landoj. Mi invitas viajn sugestojn kaj iniciatojn.

# KONTRAŬ LA DIKTATURO DE ALAHO

*el* Deklaracio de la Surrealistoj de Pakistano (En Ekzilo, 1978)

tradukis el la angla R. Dumain

Ni kraĉas sur la tutan stultan ŝaradon .... de la "iluminitaj" spektantoj de homa suferado maskitaj kiel sciencistoj, burokratoj, politikistoj, profesoroj, industriistoj, patriotoj, soldatoj kaj putinumaj beletristoj, kiuj, .... dediĉitaj al nenio krom la daŭrigo de siaj kruelaj kaj senkompataj reĝimoj, kaŝas sin malantaŭ la terura kaj putranta kadavro de Islamo.

Nur per subteno de konstanta atento de Deziro ni kapablos detrui tian bestetaĉaron, kun ties dekadencaj ideoj: subprema moralismo, religia savo, .... Patrujo, pieco, oferado, familio, kaj nacia unueco.

Ni montros nenian kompaton al Islamo, tiu 1400-jara tiraneco. Ni senlace vundos la famon de ĉiuj degeneraj oportunistoj kiuj persistas proklami ĝin. Ni malbenos kaj insultos ĉi tiun vantan aflikton kiu estas nur triviala varianto de la jud-kristana, grek-roma heredaĵo kiu sidas ĉe la bazo de ĉia moderna malpuraĵo konata kiel kapitalismo, stalinismo, maoismo, faŝismo, naziismo, parlamentismo .... kaj ceteraj ismoj kiuj reprezentas celon daŭrigi la implican sklavecon de kretena kaj kaduka sociordo.

En spirito de ĝoja, malpia magio kaj ĝisosta subfosa frateco, ni pretas alianciĝi kun ĉiuj kiuj esprimas teorie kaj praktike sian fervoran revolucian opozicion kontraŭ ĉiaj sistemoj de ekspluatado kaj humiligo.

Kun la cetera luktanta homaro ni kraĉas sur la diecon de Alaho! La "Kaaba" estos kaptata kaj forbruligata!

[fonto: *Cultural Correspondence*, #12-14, somero 1981, p. 98]

## RELIGIO EN TURKIO

de Turka Samideano

Nia lando konsistas plejparte el islamanoj, sed ekzistas kristanoj (katolikaj, protestantaj, ortodoksaj, gregorjanaj), judoj (kiuj enmigris al Turkio el Hispanio dum la Inkvicio antaŭ 500 jaroj, pro kio ili jubilos en 1992), Atestantoj de Jehovo (la ŝtato akceptis ĝin kiel oficialan religion male ol aliaj islamaj ŝtatoj), bahaanoj (kiuj estas akceptitaj de la ŝtato kaj havas oficejon, kvankam aliaj islamaj ŝtatoj ne akceptas kaj asertas ke bahaanoj servas al Israelo). Ateismo ne akceptiĝas, sed en Turkio ekzistas multaj ateistoj, speciale gejunuloj. Iam kelkaj homoj iris al jurejo por enskribigi al si legitimilon esti ateistoj, sed la jurejo ne akceptis ĝin. La ŝtato ne tute malpermesas ateismon sed ankaŭ ne helpas ĝin.

Turkio diferencas de aliaj islamaj, arabaj landoj. Nia moderna respubliko fondiĝis en 1923; nia ĉefgvidanto estis Mustafa Kemal (Ataturk). Antaŭ ol respubliko, Turkio estis imperio Ottoman; post respublikigo multaj leĝoj ŝanĝiĝis. Plej grave, oni akceptis laikan sistemon (apartigo de religiaj kaj ŝtataj aferoj). Religiuloj kontraŭstaris al tio kaj ankoraŭ fanatikuloj ne akceptas ĝin. Nun lernejoj ankaŭ estas laikaj. La jursistemo tute ŝanĝiĝis, ankaŭ mezursistemo, pezsistemo, horloĝo, kalendaro, kaj alfabeto. Lingve kaj kulture la turkoj malsimilas la arabojn. Arabaj landoj ne ŝatas Turkion kaj plendas ke ĝi ne estas vere islama lando, ke ĝi servas al la Okcidento.

Estas kvin bazaj kondiĉoj en Islamo: (1) Ŝehadet (mi atestas ke estas unu Dio, kies profeto estas Muhammed), (2) Namaz (preĝado al Dio kvinfoje ĉiutage), (3) Oruĉ (fasto), (4) Zekat (monhelpo al malriĉuloj), (5) Haĝ (vizito al Mekko en Saŭdi-Arabio). Islamanoj havas frakciojn sunnianan kaj ŝiannan. Sunnianoj mem havas kvar frakciojn: ĝaferije, durzije, ismailije, zejdije.

Dum la lernejojaroj mi estis kredanto sed poste multe legis kaj vojaĝis. Mi praktike konstatis ke

religioj ne utilas, ĉar ĉiu religio (ĉu vera ĉu malvera) defendas principojn de paco, amikeco, ktp. Sed homoj ne ŝatas homojn, ekz. islamanoj, kristanoj, kaj judoj ne ŝatas unu la aliajn. Nun mi estas oficiale islamano laŭ legitimilo sed praktike mi ne kredas je Dio, do mi estas ateisto. Ankaŭ miaj gefratoj estas ateistoj. Ni neniam preĝas al Dio, sed niaj parencoj kaj gepatroj estas kredantoj.

## DE STALINISMA AL KATOLIKA DIKTATURO EN POLLANDO

de Waldemar Nowakowski (Pollando)

Estas en Pollando skandalaj procedoj kiuj min persone tuŝas kaj pro kiuj mi freneziĝas. Unue, estas neatendite subita, eĉ stranga sinturno de niaj ŝtataŭtoritatoj al kapitalismo. La dua estas pli kaj pli forta pligrandigo de regado de la katolika eklezio. Mi estas socialisto, marksisto kiu dum longa tempo *memstare* edukiĝis ideologie, legante, konsiderante, disputante. Tiutipa direkto de filozofio estis por mi la plej bonvena, ĉar antaŭ ĉio mi deziregis justan vivon por ĉiuj. Samtempe mi estis ĉiam kontraŭulo de malfidaj totalismoj, en kiuj la plej potencaj decidantoj helpe de la socialismaj sloganoj maldemokratie regis kaj detruadis la konstruadon de aŭtenta socialismo. Ĝuste tial mi, ordinara membro de la komunista partio, pli kaj pli forte kritikis nian "vojon al socialismo." Pro tio ke mi profunde kredis pri la ebleco konstrui socialisman socion, mi des pli estis kolera vidante la fiecon de ĉiuj partiaj aŭtoritatuloj. Ĉiam mi kolere miris, kial niaj politikistoj ne volas esti memstaraj, sendependaj de Moskvo. Ĉiam tiun sendemokratian sistemon mi opiniis kvazaŭfaŝisma, vidante ke nia parlamento nur ŝajnigas labori. Ja regis nur diktature la partio. Ho, se ĝi reĝus saĝe sed regis stulte. Neniu saĝa fakulo rajtis decidi pri ekonomiaj aferoj, sed nur aparato. Kvankam oni ne povas diri ke ĉiuj stulte decidis -- estis iuj saĝaj homoj en la partia aparato kiuj zorgis pri sia tereno -- tamen ĝenerale pro la aroganteco de la reganta partio, homoj malŝatis ĝin

kaj nur deziregis liberecon kaj demokration. Tial multaj poloj sercis helpon de katolika eklezio.

Vi ne povas imagi, kiel stulta estis propagando de ateismo fare de la partia aparato... Anstataŭ zorgi pri la vera konvinko al ateismo sur la bazo de amasaj disputoj en diversaj disputrondoj, la ĉefoj de propagando zorgis nur pri formoj; ekz. policistoj, oficiroj, gravaj administrantoj, direktoroj ne rajtis frekventi preĝejojn, ĉar ne decas "tiel konduti". Se estis organizitaj iuj "disputoj", ili estis tre oficialaj, aranĝitaj speciale por gravuloj kaj vere ne estis disputoj sed prelegoj enuigaj. Nenie kaj neniam vi aŭdis, ke iu krom mi disputas ekz. kun lernantoj publike sed spontane kaj sincere pri tiuj aferoj (ateismaj kaj ideologi-politikaj). Tio estis tabuo (nun estas "krimo"). Kompreneble dum tiuj miaj multaj disputoj en societoj kaj en gelernantaj grupoj kaj eĉ dum partiaj kunvenoj mi senhezite, kuraĝe, akre kritikis la eraregojn de la reganta partio. Mi montris ke pro tia malsaĝa kaj aldone aroganta regado kaj eĉ diktaturo, post nelonge estos tioma malkontento, ke nia "vojo al socialismo" estos forĵetata, ke nia nacio malbenos entute socialismon. Ĝuste tiel okazis.

Imagu, dum la sepdekaj jaroj mi estis persekutata, taksata "danĝera reviziisto", pli danĝera ol homamasoj kiuj ĉiam estis kontraŭsocialismaj sed neniam publike laŭte deklaris tion (nur en sia "societo" aŭ se ili estis ebriaj). Multe mi povus rakonti al vi pri amaso da obstakloj en miaj diversaj laboroj, pri timigado, kaj ĉio ĉi okazis dum tiuj jaroj en kiuj regis "komunistoj". Finfine mi sukcesis ricevi laboron kiel instruisto ....

Vi scias ke gejunuloj estas tre scivolemaj, diskutemaj. Nu, mi kiel historiisto konsentis respondi diversajn demandojn, klarigi la mondon konvene al miaj scio kaj filozofio. Mi intencis organizi oficiale diskutrondon pri mondperceptaj aferoj. Tio estis dum la milita ŝtato kaj mia ĉefo malpermesis tion. Mi devis rezigni pri oficialigo de tiutipaj disputoj sed mi tamen faris tion neoficiale. Okazis multfoje tre interesaj disputoj kaj mi intencis organizi oficiale diskutrondon pri mondkon-

ceptaj aferoj. Tio estis en la "milita stato". Sed mia ĉefo malpermesis tion. Vole-nevole mi devis rezigni pri oficialigo de tiutipaj disputoj, sed mi tamen faris tion neoficiale dum kaj post miaj okupoj, ec ofte en la loĝejo dum dimanĉoj kun pli inteligentaj studentoj.

Nu, ni ne plu havas multajn tiajn diskutojn, ĉar miaj studentoj jam finis mezlernejon kaj nun studas aliloke. Des pli mi estas devigata disputi, ĉar pro tro vigla vivo religia en Pollando multaj junuloj komencas disputojn. Iuj speciale malice volas kvereli kun mi sciante ke ili -- katolikuloj -- "estas pravaj nun, estas venkintoj oficiale". Aliaj alimaniere demandas min kia estas vero, ĉar kvankam katolikaj, ili sentas sin *stultigataj* dum la religiaj lecionoj. Okazas eĉ kvereloj inter ili -- dogmuloj kontraŭ tiuj kiuj dubas jam iomete, ĉu pastroj kaj gepatroj pravas. Do mi devas konsili. Imagu, ke multaj jam rezignis pri plua kunlaboro kun mi. Multe mi perdis, -is, kaj -os ĉar mi estas ateisto, sed kion mi faru?

Mi timas, kio okazos en la venonta lernojaro, ĉar estas diversaj metodoj por tute detrui min, se ekz. iu pastro ekscios pri mia agado. Nuntempe en Pollando sufiĉas ke iu pastro vizitus min kaj miajn studentojn kaj interparolus kun ili dum ĉeesto de mia direktorino (eksa grava partiano, nun tre "pia" katolikistino). Sufiĉus, ke mi ricevus ordonon pendigi krucon en mia salono, ktp. Kompreneble, mi absolute ne konsentos, sed la pastro diros ke miaj studentoj "petas" tion kaj ke mi "diktatore" malkonsentas, do mi foriru kaj serĉu laboron alie. Ĉu vi scias ke nun estas terura senlaboreco en Pollando? (Se plu daŭros tiel, mi opinias ke denove okazos ribelo [iu nova *Solidarinosc*]). Cetere, mi timas ke nia Junulara Kulturdomo ne longe plu ekzistos.

Aspektas ke ĉie en hospitaloj en Pollando pendas krucoj. Neniam en la parlamento okazis diskuto pro tio -- ĉu tiel oni faras en demokratiaj landoj? Oni enkondukis religion en lernejojn senparlamente. Decidis nur nia ministro de edukado, historiisto, eks-partiano, "marksisto", nun videbla je televido

celebrante en preĝejo. Multegaj intelektuloj, iam eminentaj servantoj de la partio, ŝanĝis kolorojn kaj simile servas al eklezio. Ĉu vi imagas kiel mi sentas en ĉi tia stulta lando?

## e1 KONTRAŬRELIGIA PROPAGANDO

de Leono Trockij
el anglalingva traduko tradukis R. Dumain

.... Tute evidente kaj nedisputeble, nuntempe ni ne povas meti nian kontraŭreligian propagandadon ĉe la nivelo de senpera batalo kontraŭ Dio. Tio ne sufiĉus por ni. Ni elradikigas mistikismon per materiismo, unuavice per larĝigo de la kolektiva sperto de la homamasoj, instigante ilian aktivan influon je socion, larĝigante la horizonton de ilia pozitiva scio, kaj baze de ĉi tio ni batu ankaŭ laŭnecese kontraŭ religiaj antaŭjuĝoj.

.... Kiel junulo Marx diris: "la kritiko al religio estas la bazo de ĉia cetera kritiko." Kiusence? Tiel ke religio estas speco de fikcia scio pri la universo. Ĉi tiu fikcio havas du fontojn: la malforteco de la homo rilate al naturo, kaj la *malkohereco de sociaj rilatoj.* Timante naturon aŭ ĝin ignorante, povante analizi sociajn rilatojn aŭ ilin ignorante, la homo en socio celis kontentigi siajn bezonojn per kreado de fantazioj, dotante ilin per imagita realeco, kaj surgenuiĝante antaŭ propraj kreaĵoj. La bazo de ĉi tiu kreado estas la praktika bezono de la homo orienti sin, kiu siavice devenas de la kondiĉoj de la lukto por ekzisto.

Religio estas provata adaptaĵo al medio por sukcesi je la lukto por ekzisto. En ĉi tiu adaptaĵo estas praktikaj kaj taŭgaj reguloj. Sed en ĉi ĉio intermiksiĝas mitoj, fantazioj, superstiĉoj, nereala scio.

Kiel la disvolvo de kulturo estas la akumulado de scio kaj lerto, tiel la kritikado al religio estas la bazo por ĉia cetera kritikado. Por malobstrukci la vojon por ĝusta kaj reala scio, necesas forigi fikcian scion. Ĉi tiu propozicio validas

nur kiam oni konsideras la demandon kiel tuton. Historie, ne nur je individuaj kazoj sed en la evoluo de tutaj klasoj, realaj scioj intermiksiĝas diversforme kaj diversproporcie kun religiaj antaŭjuĝoj. La lukto kontraŭ iu religio aŭ religio ĝenerale kaj mitoj kaj superstiĉoj, kutime sukcesas nur kiam tiu religia ideologio konfliktas kun la bezonoj de iu klaso en nova socia medio. Alivorte, kiam la akumulado de scioj kaj la bezono de scioj ne kongruas kun la framo de la nerealaj veroj de religio, tiam unu frapo per kritika tranĉilo kelkfoje sufiĉas, kaj la ŝelo de religio defalas.

.... La tuta aboligo de religio estos atingita nur kiam ekzistas plene evoluigita socialisma sistemo, t.e., teknologio kiu liberigas la homon el ĉia malnobliga dependeco je naturo. *Tio atingeblas nur en sociaj rilatoj kiuj estas liberigitaj el mistero, kiuj estas tute klaraj kaj kiuj ne subpremas homojn.* Religio tradukas la kaoson de naturo kaj la kaoso de sociaj rilatoj en la lingvon de fantaziaj imagoj. Nur la aboligo de surtera kaoso povas fini por ĉiam ties religian reflekton ....

[Ĉi tiu teksto estas ĉerpita el parolado "Leninismo kaj Laboristaj Kluboj" je la 17-a de julio 1924. Anglalingvanoj povas trovi ĝin en ***Problems of Everyday Life and Other Writings on Culture and Science*** (New York: Monad Press, 1973.)]

*N.d.l.R.: Ne aperas ĉi tie longaj priskriboj de specifaj faktoj kaj rimedoj rilataj al la tiutempaj kondiĉoj de kamparana, neevoluinta, novsovetia socio. Sed ankaŭ tiuj partoj de la tuta teksto reliefigas la grandan kontraston inter la metodoj de Trockij kaj de Stalin pri agmaniero kaj popolklerigo pri religio kaj ateismo. La emfazojn en ĉi tiu teksto aldonis mi, ĉar nuntempe manko de scienco kaj teknologio kaj rezultaj superstiĉoj pri naturo ne estas plu grava problemo en industriigtaj landoj. Religio restas kaj eĉ plifortiĝas, ankaŭ en Sovetunio kaj orienta Eŭropo, ĝuste pro mistifiko kaj malkontentiga stato de sociaj rilatoj. Unuaprioritate, nuntempaj ateistoj devas kompreni tion.*

# KELKAJ BRULAJ DEMANDOJ: RELIGIO EN HINDUJO

de Margaret Bhatty
Tradukita de Sergio Docal (Usono)

Kiam ceremonia bruligo de vivanta virino fare de bando da fanatikuloj ĉe funebra brulŝtiparo de ŝia morta edzo ne estas murdo? Ĉu ĉiutagaj surteraj leĝoj inspiritaj de humaneco kaj justeco estas ignoreblaj se tiu vidvino volonte grimpas la brulstakon en pruvo de sensencaj pieco kaj fideleco encerbigitaj al ŝi kiel decas al hindua edzino? Kaj kiu estas la kulpulo en iu socio kiu tiel muldas la mensojn de inoj, ke ili akceptas propran sklavecon eĉ ĝis la ĉirkaŭpremo de morto?

La legantoj memoros mian artikolon "Virinoj kaj la Leĝo de Karmo" (***American Atheist***, aŭgusto 1984) koncerne la riton de *satio* en hinduismo.[1] Ĉi tie memmortigo (pli ĝenerale kovrilo por murdo) fariĝis rito akorde kun la kredo je posta vivo laŭ kiu la estanta vivo estas nur ero en cikla ĉeno de ekzistoj. Ĝi, do, estas ligata ne nur al antaŭaj, sed al postaj vivoj, kaj kio ajn okazas ĉi tie kunportas rezultojn al la venonta ekzisto. Por hindua edzino ĉi tiu koncepto havas profundan signifon.

La 4-an de septembro 1987, belega 18-jarulino el Rajput laŭdire plenumis sation en Deorala, aŭtomobile kelkhore for de ĉefurbo Jaipuro. Roop Kanwar estis edziniĝinta nur dum sep monatoj al Mal Singh, kiu mortis subite pro severa atako de gastroenterito. Laŭ boparencoj, ŝi trankvile anoncis sian intencon fariĝi satiulino por ke sia spirito povu resti unuigita kun tiu de sia edzo. Neniu tro forte kontraŭis ŝin. La familion pli koncernis la eblo ke ili eble fariĝos objekto de moko se ili permesus ĝin. Tamen, tiuj kiuj planis la teruran riton, pro ajna kialo, ankaŭ planis aparte teruran malbenon: iu ajn homo kiu klopodos preventi sation riskos tutan detruon de siaj vilaĝoj kaj familioj. Ĉi tiu estis la dua kazo de satio en Deorala dum 70 jaroj.

Vortoj flugis rapide, kaj la loĝantoj de Deorala alkuris al la kremaciejo, sagace lokita proksime al la loĝejo de la koncerna familio. Maljunuloj kaj panditoj (saĝuloj) alkuris al la domo por certiĝi ke la junulino meritas la elstaran honoron. Nesurprize, oni trovis ŝin meritplena. Benita de siaj boparencoj kaj ornamita en siaj geedziĝfestoj, Roop Kanwar iris ĉirkaŭ la vilaĝo kun kokoso en la mano. Ĉe la *sati sthal* (satia loko), ŝi grimpis la ŝtiparon, metis la kapon de sia edzo sur siajn femurojn, kaj lasis ke la flamoj forkonsumu ŝin dum ŝi sekvis lin al la postvivo. Ĉeestantoj deklaris ke ŝia vizaĝo restis brilanta ĝis la fino mem.

La ŝtiparon ekbruligis la pli juna frato de la mortinto, kiu estis poste arestata kaj sendata al punejo por junuloj ĉar li havis nur 15 jarojn. Iuj diris ke la ligno ne tuj ekbrulis do bonkoraj najbaroj kurrapidis hejmen kaj revenis portante bubalbuteraĵon (klarigitan buteron), kiun ili verŝis sur la ŝtipoj, kiuj tuj ekflamis. Ilia eltrovemo estas vere laŭdinda.

Tamen, mi havas antaŭ mi informfolion presitan en la hindia lingvo kaj subskribita de la tri membroj de speciale starigita komitato. Ĝi alvokas la benon de la *Maha Sati* (la Granda Satio) kaj varbas ke ĉiuj venu kaj adoru ŝin. La titolo estas: ***Satio Estas Afero de Fiero por la Socio!*** Ĝi diras ke la ŝtiparo dekomence ne ekbrulis ĉar la knabo ŝvenis. Roop Kanwar tiam komencis kanti la plej sanktan el ĉiuj hinduaj mantroj[2], kaj fajro elvenis el ŝia buŝo "kvazaŭ sago" kaj ekbruligis la ŝtiparon. Ŝi restis sidanta sen hezito eĉ ĝis la fino, benante la spektantojn kaj petante ke ili ĉiuj vivu feliĉe. Ili respondis per frenezaj krioj de *Sati Mata Ki Jai* (Venku Patrino Sati)!

La folio sekve rakontas la miraklojn kiujn Roop Kanwar jam faradis. Lamaj homoj ĉirkaŭiris la ŝtiparon kaj resaniĝis, kaj ankaŭ nekuracebluloj resaniĝis "dum sekundoj".

Centoj da piuloj kaj scivolemuloj alvenis amase el apudaj vilaĝoj. La boparencoj de Roop Kanwar negoce establiĝis. Kokosoj kaj aliaj oferaĵoj far-

itaj ĉe la satia ŝtiparo estis distribuataj inter la kredemuloj, kaj mono versiĝis dense kaj rapide. Post kelkaj tagoj, ili kolektis kvar milionojn da rupioj, laŭdire por konstrui sanktejon. La loko de la murdo estas sufiĉe proksima por ke ili prizorgu la aferojn de la templo, kaj tio havigus al ili luksan vivon dum kelkaj venontaj generacioj.

Roop Kanwar ankaŭ alportis tujan prosperon al Deorala. Pli ol 800 budoj ekvendis objektojn de *puja* al la pilgrimoj, ĉio je ŝveligitaj prezoj, same kiel glaciaĵojn, sukon de sukerkano, ŝmiraĵojn, juveletojn, kaj similajn bagatelajn ornamaĵojn kiuj altirus junajn vilaĝaninojn. Grandega kampara foiro baldaŭ vigle funkciadis.

Dumtempe, la piuloj ĉantadis kaj tamburadis tage kaj nokte kaj kriadis "Sati Mata Ki Jaj!" Homamaso taksita je 500 000 baldaŭ kolektiĝis en Deorala por adori la novkreitan diinon. Dudek unu rajputanaj viroj ĉirkaŭiris la satiejon ĉiumomente portante rustiĝintajn glavojn. Tio estis kun la celo eviti ke magiisto ŝtelu el la cindroj por uzi ilin por kapti la spiritojn de la mortinta paro.

Laŭ onidiro, unu tia fiulo en blua ĉemizo alproksimiĝis al la brulanta ŝtiparo, sed Roop Kanwar facile eltrovis lin kaj hezitis en la deklamado de la "gajatri-mantro". Oni batadis lin kaj li forfuĝis. La koloro bluo malfortigas la potencon (*shakti*) de satiino. Dum du semajnoj post la morto de Roop, neniu en la vilaĝo uzis bluigaĵon por lavi la vestojn!

En la urbo Jaipuro, aktivistinoj procesiis postulante la malpermeson de la kutimo bruligi vidvinojn. Post nemalmulta penado kaj malgraŭ minacoj al ŝia vivo, tre energia advokatino sukcesis farigi la altan kortumon ordoni ke la ŝtata gubernio arestu la kulpulojn kaj zorgi por ke adorado ne estu permesata nek sanktejo konstruiĝu ĉe la satiejo. Ĝi ankaŭ ordonis ke la kutima rito de dediĉo je la 13-a tago ne okazu.

Tamen, la 600 policistoj senditaj al la regiono estis instruitaj ne esti tro videblaj, sed sin

miksi civil-vestitaj inter la loĝantaro por eviti malordon. La klopodoj de la registaro de Rajasthan plenumi la ordonojn de la kortumo estis senenergiaj ĉar la aŭtoritatuloj estis dividitaj inter tiuj kiuj favoras sation kaj tiuj kiuj kontraŭas ĝin. Kiam la parlamento kunvenis, tiom da konfuzo estiĝis ke oni devis halti la kunsidon. Dum la paŭzo, la ĉefa ministro proklamis ordonon de mortpuno por la kulpuloj kaj malliberigo por tiuj kiuj propagandis la kulton. La ordono estis tuj kontestata en la kortumo kiel kontraŭkonstitucia ĉar ĝi ne estis adoptita de la parlamentanoj, kaj kiel maldemokrata ĉar ĝi konfliktas kun la klaŭzo kiu garantias liberecon praktiki la propran religion.

La rito *Ĉunari Mahotsav* okazis sen malhelpo nek problemo je la 13-a tago, kun 101 bramanoj [t.e. anoj de la sankta aŭ sacerdota kasto], kiuj malvarmigis la cindrojn per lakto kaj akvo el la rivero Ganges, kaj kun la adorado de tridento de Ŝivao. La familio donis manĝon al 1 001 bramanoj kaj disdonis 25 kilogramojn da dolĉaĵoj. Ikonogramo kreita de fotografisto uzante la geedziĝan foton de la paro montris Roop Kanwar en la ŝtiparo kun la kapo de la edzo antaŭ ŝi. Kopioj vendiĝis po ĝis 50 rupioj kaj dum nur unu tago piuloj aĉetis kaj portis hejmen por adori preskaŭ 30 000 kopiojn.

Eble la leganto pensas ke la popolo de Deorala konsistas el nesciantaj, sadismaj sovaĝuloj kun ŝtonepokaj mensoj. Fakte, Deorala estas progresema vilaĝo kun sep lernejoj, dispensario, sanskrita instituto, kaj *panĉajat* (loka gubernia konsilantaro). Sur la geedziĝa foto Mal Singh portas okcidentstilan kompleton kaj kravaton, kaj Roop Kanwar montras senvualan vizaĝon. Li estis scienca bakalaŭro kaj ĵus estis akceptita de medicina lernejo, dum siavice ŝi estis diplomita de gimnazio. La 21 junuloj kiuj gardis la cindrojn estas diplomitoj de lernejoj kaj kolegioj. La patro de Mal Singh estas lernejestro dum 30 jaroj, kaj liaj ceteraj gefiloj ankoraŭ edukiĝas.

En intervjuo en hindia revuo, la patro de Mal Singh deklaris ke li ne bone fartis kaj svenis pro la ŝoko de la morto de sia plej olda filo, kaj do

li sciis nenion pri la satio. Tamen, la sama raportisto parolis kun membroj de la familio, kiuj diris ke Roop Kanwar petegis ke li permesu ke ŝi fariĝu satio, kaj li konsentis.

Ironie, la patro de Roop Kanwar en Jaipuro ne sciis pri ŝia morto ĝis kiam ĉio estis finita. La aŭtomobilo de la mesaĝisto paneis sur la vojo. Li diris ke li estas kaj ĉagrenita kaj feliĉa. Ĝi estas evento kiu famos en la historio, li aldonis. Ĝi ankaŭ levis lian pozicion ĝis la plej alta en la komunumo. Ĉi tiu amanta patro donacis 100 000 rupiojn por la konstruo de sanktejo memore al sia filino, dum lia pia edzino nun ĝuas la respektegon de orakolo, ĉar oni kredas ke Roop Kanwar, la *Sati Mata*, parolas per la buŝo de sia patrino.

Policistoj senditaj al la loko de la krimo trovis la vilaĝanojn malvolantaj paroli. La kelkmiloj kiuj ĉeestis la bruladon ŝrumpiĝis kvante. Multaj diris ke ili ne vidis ĉu la junulino estis perforte bruligata, ĉar laŭ la kutimo, ili turnis la dorson al la ŝtiparo.

Delegacio da ĵurnalistinoj el Bombajo faris sian propran diskretan enketon. Al ili oni diris ke perforto estis uzata kontraŭ Roop Kanwar. Tute senhelpa, ŝi fuĝis el la hejmo kaj kaŝis sin en pajlejo tuj kiam ŝi ekscis ke siaj boparencoj intencas bruligi ŝin. Oni trovis ŝin, perforte eltrenis ŝin, kaj donis al ŝi fortan narkoton. Oni rimarkis ke ŝi ŝajnis stupora kaj ŝaŭmis el la buŝo kiam oni portis ŝin al la ŝtiparo. Satioj ricevas specialan dekoktaĵon de kanabo kaj mortiga beladono por sensentigo. Kelkaj diris al la ĵurnalistinoj ke kiam ŝi falis dorsen el la ŝtiparo kaj oni remetis ŝin tien, ŝi fakte strebis fuĝi. Kelkfoje ŝi laŭtkrie vokis siajn gepatrojn.

Se ĉi tio estas vero, la morto de Roop Kanwar ne estis glora faro de sinofero priskribita de ortodoksaj hinduoj. Ĝi estas nenio pli eksterordinara ol la oftaj "kuirejaj akcidentoj" kiuj ja okazas al multaj bofilinoj.[3] Ĉar Roop Kanwar ne havis fil(in)on, oni estus resendinta ŝin al ŝia familio, kaj kun ŝi ĉiujn aĵojn kiujn ŝi alportis kiel sian

doton, t.e. kolortelevido, fridujo, bankkonto kun 30 000 rupioj, kaj multe da oro kaj juveloj. Ĉio ĉi nun estas eta valoro por ŝiaj boparencoj, nun kun riĉoj plenigantaj iliajn kestojn, kaj grandegaj donacoj alvenantaj eĉ de ĉefaj industriistoj kaj politikistoj. Virinaj organizoj postulas ke oni jure persekutu tiujn donacintojn, kaj ke la mono estu reprenata fare de la registaro kaj uzata por konstruo de rekapabliga centro por vidvinoj savotaj el la satia ŝtiparo.

Kia estus la vivo de Roop Kanwar se ŝi pretervivus? Kvazaŭ vivanta morto. Iusence, ŝia vivo finiĝis kiam ŝi fariĝis vidvino. Post tio ŝi estus malbenaĵo, virino de fatala naturo kiu formanĝegis sian propran edzon. Se ŝi mem estus la mortinto, la familio de Mal Singh baldaŭ reedzigus lin. Sed kiel ino, Roop Kanwar restas eterne ligita al li kiel lia edzino. Ekde sia aĝo de 18 jaroj ŝi devus daŭre funebri por pagi sian pekon kaj rekuniĝi kun li en la venonta vivo.

LA SORTO DE HINDUA VIDVINO

La sorto de hindua vidvino eble estas la plej mizera iam ajn pensita fare de viroj por siaj virinoj. Ĉia komforto estas malpermesita: ili fariĝas forbaritaj el ĉiuj festivaloj, la kapoj razuritaj ĝisharte, braceletoj kaj juveloj rompitaj, vestitaj nur blanke. Vidvino foje estas taksata kiel malpura kaj barata el la kuirejo, kaj manĝaĵoj estas ĵetataj al ŝi, ne servataj. Vidi ŝin frue matene povas ruini ies tagon. Mi konas kazon de bramano kiu ekpensis punon por vidvino kiun ŝi obeis sen plendo, kvankam ŝi estis edukita. Ŝi devis manĝigi kvin tipojn de grajnoj al bovino, poste serĉi tra la ekskremento, eltiri tion kio ajn restis nedigestita, lavi kaj mueli ĝin, kaj prepari la malfajnan solan manĝon permesatan al ŝi dum la tago. Iuj vidvinoj de Deorala intervjuitaj fare de aktivistino esprimis bedaŭron ke ili ne havas la kuraĝon ankaŭ plenumi sation, anstataŭ tiel vivi. Tamen, ili konsentis, ke se ili estus donitaj egalajn rajtojn kiel viroj kaj la eblecon vivi kun digno, ili neniam eĉ konsiderus sation.

En registara televizia programo pri la satio de Deorala, ni aŭskultis apologiistojn kiuj eksplikis ke satio ne estas postulata de la sanktaj skriboj kaj estas kruela praktiko kiu fariĝis parto de hindua tradicio. Kiel socia malbono ĝi devas esti haltigata. Tamen, ni ankaŭ aŭskultis la ĉefgvidanton de la *Janata* partio de Rajastanio deklari ke ĝi estas hindua rito kiun neniu povas preventi.

La debato limiĝas al ununura faktoro. Se edzino volonte celas morton, neniu forto surtera povas evitigi ĝin. Sed se ŝi estas perfortigita, la kulpulo devas esti punata pro murdo. La problemo estiĝas kiam oni klopodas deklari kulpulon. Malmultaj dotaj mortoj estas juĝataj en kortumo. Tamen la vero estas ke multaj satioj ekde la pratempo ĝis aktualo estas perfortaj. Raĝo Ram Mohan Roy mem firme decidis elradikigi la aĉan aferon kiam, estante knabo, li vidis la junan vidvinon de sia frato kruele trenata al la morto kontraŭvole. Ofte oni tenis vidvinojn sub pezaj trunkoj, aŭ oni fosis profundan tranĉon ĉirkaŭ la ŝtiparo por preventi ilian fuĝon.

La rekompencoj ofertataj al tiaj virinoj estas imponaj. Ili loĝos en la ĉielo dum tiom da jaroj kiom haroj troviĝas sur iliaj kapoj kaj korpoj -- ĉirkaŭ 3½ *kror*-jarojn (*kror* = 10 000 000). Plue, se ili mortas premante la mortan edzon, ili gajnos por la viro pardonon por la krimo murdi bramanon aŭ amikon kaj por la peko de maldankemo. Ili ankaŭ purigas la familiojn de siaj patroj, patrinoj, kaj edzoj.

La rifuzo plenumi sation kondamnigas multajn naskiĝi kiel virinoj refoje kaj refoje. Antikvaj verkistoj pri hindua jurisprudenco asertadis ke la plenumo de satio estas la sola devo de fidela edzino. Tamen, estas kelkaj kondiĉoj: Ili devas ne esti gravedaj nek havi malgrandajn infanojn, kaj ili devas esti postpuberaj. Ankaŭ, ili ne menstruu tiutempe. Konsiderante la mensmalsanan sintenon koncerne ĉi tiun naturan funkcion, la kapablo de ĉi tiu kondiĉo savi vivojn iel incitas min al rikana ridego.

## POLITIKAJ SEKVOJ

Dum pro-satia manifestacio en Jajpuro, la prelegoj donas ideon de la nova batalemo de hinduismo. Pastroj cantis la sanktajn skribojn kaj prelegantoj prognozis la detruon de Rajiv Ghandi se li klopodus tusi la hinduan religion kaj ŝanĝi ĝin per leĝoj. Iu diris, "Jen nur la komenco. Ni portos la batalon kontraŭ ĉi tiu atenco al la hindua *dharam* ĝis ĉiu angulo de la lando."

Ghandi estis denuncita pro malaparteno al la korekta religio por regi la landon. "Li estas Parsio kaj edziĝinta al fremda virino kiu insultas la hinduan religion," diris iu politikisto. Tiu forte instigis ĉiujn defii la ŝtatan leĝon kontraŭ satio kaj reiri al Deorala por konstrui sanktejon. Fajrakora junulo saltis al la scenejo kaj anoncis la starigon de rajputa sturmtaĉmento. Eksa registara oficisto deklaris ke se la ceteraj hinduoj ne apogos ilin, la rajputanoj secesios kaj postulos sian propran ŝtaton, kiel la Sikoj de la Panĝabo. Jen ĉio ĉi nur por bruligi onies virinojn en paco!

Malgraŭ la leĝo de 1829 aprobita de Lordo William Bentinck danke al la klopodoj de Raĝo Ram Mohan Roj, la rito neniam vere malaperis. Dek ok satioj estas plenumitaj dum la kelkaj lastaj jaroj. Neniu estis iam ajn punata. Kiam la polico sukcesis savi viktimojn, supozeble kontraŭ iliaj voloj, ili estis konservataj en en temploj kie ili estis adorataj ĉiutage, farante miraklojn kaj enspezante monon por siaj konservantoj. Estas superstiĉo ke ĉi tiuj Sati-Matoj ĉeestas nur spirite; iliaj fizikaj korpoj laŭsupoze estis kremaciitaj kune kun iliaj edzoj. Ili bezonas nek manĝon nek akvon. En sanktejo de Jodphur, unu tia virino pluvivis en templo dum 40 jaroj sen ia ajn nutraĵo. Eĉ edukitaj homoj kredas ke tio eblas.

En la pasinteco, se nevolonta vidvino fuĝis el la ŝtiparo, ŝi estas jam morta por siaj geamikoj kaj parencoj, kaj akceptebla nur de la Netuŝeblul-oj. Britaj oficiroj kaj oficistoj kelkfoje savis satiojn, kaj Job Charnock, la fondinto de Kalkuto, edziĝis al bela bengala junulino kiun li savis, kaj

vivis feliĉe kun ŝi ĝis ŝia morto. Li poste regule mortigis kokon ofere al si ĉe ŝia tombo, ĝis sia morto en 1693.

La teno de ci tiu makabra kutimo ankoraŭ estas forta en kelkaj hinduaj sektoj. La *Ŝankaraĉarja* de *Puri*, unu el la plej agresemaj el la hinduaj pontifikoj, favoras ĝin. Li kredas ke "la tero ekvilibras sur la *shakti* (potenco) de Sati Mata." Dekstrulaj hinduaj partioj sendube ekspluatos la politikon de rostado de vivantaj virinoj. Antaŭnelonge eĉ en 1976, kvar sati-temploj estis konstruataj en Delhio mem. Sennombraj sati-sanktejoj ekzistas en Rajasthan, kien la piuloj aliras por adori. Pli ol 124 foiroj estas celebrataj tra la tuta lando por festi la morton de ĉi tiuj kompatindulinoj.

La frenezeco, la bruado, kaj la pia pravigo de tia sadismo akordas kun la epoko. La krio ke hinduismo troviĝas en danĝero tuj puŝas trident-ŝvingantajn maniulojn sur niajn stratojn. Bedaŭrinde, la komunumo ne estas produktinta gvidantojn ĉe la nivelo de tiuj deknaŭ-jarcentaj reformistoj kiuj malpermesis sation, enkondukis edukadon por knabinoj, klopodis halti murdadon de infaninoj kaj geedzigon de infanoj, kaj makleris la re-edziniĝon de vidvinoj. Aktuale, hinduismo estas vere en danĝero -- ne de ekstere, sed de interne.

PRI LA VERKISTINO: En 1978, la eldonistoj de ***American Atheist*** [Usona Ateisto] serĉis kaj trovis iun kiu volontus regule raporti pri hinduaj religiaj aferoj. Margaret Bhatty, en Nagpur, bone konata feminista ĵurnalistino, konsentis fari tion. Ŝi aldoniĝis al la stabo de la revuo en januaro 1983.

NOTOJ DE LA TRADUKINTO

1 Laŭ PIV: *satio* estas hindua moro kiu postulas ke vidvino sin oferu sur la ŝtiparo kie forbrulas la kadavro de la edzo, malpermesita ekde 1829, sed, ni aldonu, ankoraŭ praktikata.

2 PIV: mantro = budhisma formulo tirita el sankta libro kaj ripetata dum mensa koncentriĝo.

3 Laŭ novaĵoj foje legataj en usonaj ĵurnaloj, ekde la malpermeso de satioj, kvankam ili malpli ofte okazas publike, ili ankoraŭ okazas hejme kaj estas deklarataj "kuirejaj akcidentoj".

[Ĉi tiu artikolo, "Some burning questions", originale aperis en ***American Atheist,*** januaro 1988, p. 33-35.]

## BIBLIOGRAFIAJ NOVAĴOJ


Alain, Jean-Marie. "Religia integrismo" [letero], ***Sennaciulo,*** septembro 1990, p. 80.

"Altar Esperanto", ***30 Days,*** januaro 1991, p. 29. Anglalingva artikolo en katolika gazeto.

Bonaero, Ergoto de. ***La Ateismo Egalas al Sakstrato.*** Buenos Aires: Argentina Esperanto Instituto. 72 p.

Boulton, Marjorie. "Salman Rushdie: plureculo kontraŭ enfermitoj", ***Sennacieca Revuo,*** n-ro 119, nova serio, 1991, p. 4-9.

Hegen, Roland H. ***Ĉu Batalo por Ekzistado aŭ Solidareco?*** 27 p. Esperanto-Centro Humanismo, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6738 ELMSTEIN, Germanio.

______________. ***Dialogo*** [bulteno], #1, 1991.

______________. "Por serĉantoj de spirita renesanco", ***Esperanto,*** julio-aŭgusto 1990.

"Kongresaj diservoj" [leteroj], ***La Brita Esperantisto,*** julio-aŭgusto 1991, p. 123-124.

Lepeix, Jacqueline. "Pri ´Ĉu ĉiuj religioj samcelas?´", ***Asistilo,*** n-ro 6, aŭtuno 1990, p. 61-62. Mencioj de ATEO ĉi tie kaj alie (p. 43).

***Monda Humanismo: Internacia Humanisma kaj Etika Unuiĝo.*** 8 p. Oudkerkhof 11, 3512 GH Utrecht, Nederlando.

# DEMANDARO .... KAJ LA DIOJ RESTAS SURDAJ KAJ MUTAJ

de Luis Serrano Pèrez (Hispanio)

Kiom da homoj mortis nome de la Dioj? Kiom da militoj eksplodis nome de la Dioj? Kial oni preg$_{as}$ al la Dioj, kaj oni mortigas la najbaron? Kial oni konscie timigas la homojn per la puno de la Dioj? Kiom da Dioj estas? Kial ĉiu preĝas al sia Dio? Kial la Dioj, ĉiuj Dioj, ĉiam silentas? Kial, kiam en la milito unu mortigas alian, la mortiganto diras "mi mortigas nome de la Dio" kaj la mortigito diras "mi mortas nome de la Dio"? Ĉu estas iu Dio, kiu tion komprenos? Kial la homo, multaj homoj, kredas je tiuj mensogoj? Kial la homo ne evoluas al plej racia sento kaj agado? Ĉu, se eĉ arbofolio ne moviĝas sen dia volo, okazas tiuj homaj masakroj? Ĉu la Dioj tion konsentas? Ĉu la ĉionpova Dio ne povas tion haltigi? Ĉu la potenca Dio ne povus montri al ni la feliĉan vivon, por ĉiu homo? Kia Dio aŭ Dioj estas tiuj, kiuj toleras tiun sovaĝan kunvivadon? Kial oni instigas la homon mortigi nome de Dio? Kial la klerikuloj benas la kanonojn, per kiuj oni mortigos homojn, kiuj siavice agas same? Se la Dio aŭ Dioj estas tiom ĉionpovaj, kial ili toleras, ke oni uzu ties nomon por la malbono? Kial, se ni dependas de la diaj deziroj, ni ne estas feliĉaj? Ĉu tiu inventaĵo de la Dio aŭ Dioj ne estas la granda negoco de iuj? Kial kiam almozulo diras "helpu min nome de Dio", tre ofte oni lin respondas: "mi ne povas; Dio vin akompanu"? Kial la riĉuloj preĝas por ke Dio aŭ la Dioj zorgu pri sia vivnivelo kaj la malriĉuloj preĝas por forigi sin de sia vivnivelo? Ĉu estas du Dioj, tiu de la riĉuloj kaj tiu de la malriĉuloj? Kial oni promesas, ke Dio premios la malriĉulojn en la ĉielo? Kiam iu mortas, oni diras, ke estas deziro de la Dio aŭ Dioj; ĉu estas Dio aŭ Dioj kiuj mortigas homojn? Kial oni trompas la homojn nome de Dio? Kial Dio aŭ la Dioj havas "tiun abstraktan korpon nek videblan nek tuŝeblan"? Kial la homa menso estas kaptita de tiuj promesoj nerealaj? Kial nome de Dio aŭ Dioj oni sklavigas la homojn? Kial la homo povas esti tiom stulta? Kial la religioj estas tiom influaj en la homa menso? Kial la

homo sentas timon antaŭ io nek videbla nek palpebla? Kial la religioj kreas tiajn fanatikulojn? Ĉu ĉio dependas de Dio aŭ de la Dioj? Do pri kio ni decidas en la vivo? Kiu kuraĝus diri, ke Dio ekzistas; kiu vidis Lin? Kiu povas aserti pri dia ekzisto?

## NIA DIO ESTAS INTERNA IDEO DE L.L. ZAMENHOF KAJ EKOLOGIO DE V.I. VERNADSKI

de Prof-o H. Marinov (Bulgario)

Zamenhof kaj Vernadski estis samtempuloj, grandaj intelektoj de la jarcento, donintaj al la homaro gravajn ideojn, kiuj unuafoje estis esprimitaj ruslingve. Zamenhof naskiĝis en 1859 en Bialistok, en la tiama rusa imperio, studis medicinon en Moskvo, estis kuracisto en Grodno. V.I. Vernadski, akademiano, enciklopediisto, sciencisto, naskiĝis en Sankta Petersburg en 1863, studis en universitato en Petrograd. Li instruis pri la biosfero kaj noosfero, scienco bazita sur la principo de la unuiĝo de la tuta homaro. Vernadski donacis al la homaro la sciencon pri la biosfero -- la viva kovrilo de la planedo kiel komuna domo. Simile, Zamenhof trovis genian rimedon por lingva interkompreniĝo de la homaro.

La nova ideologio de la noosfero temas pri transformiĝo de la nuna biosfero al sfero de racio. Laŭ la ideoj de Vernadski, kreiĝas nova, supera, materia unueco -- la "homiĝanta naturo" de Marks. Sed tiu natura unueco kunligita kun la homa racio estus mekanikeca, morta unueco, se ne ekzistus komuna internacia lingvo. La ambaŭ geniuloj, naskiĝintaj en la sama epoko kaj lando, venis sendepende al gravaj homaj ideoj.

Ni tre ofte ne alte taksas la "internan ideon" de Zamenhof, sed aktuale ĉi tiu homeca ideo tre gravas. Venis jam la tempo por nova interpreto. Oni devis per scienca argumento likvidi ĝian vulgarigon, surbaze de la dogmatisma marksismo. Tute prave Istvan Nagi skribis, ke ĝi ne estas panaceo

kontraŭ la sociaj difektoj de kapitalismo.[2]

Dum la tempo de stalinismo oni kritikis Vernadski same kiel Zamenhof kiel grandan idealiston. Oni devus ne kontraŭstari tian humanismon al marksismo. Nun en la epoko de la nova socia pensado kaj realigo de la teorio pri la tutmonda terkovrilo, oni vere povus diri, ke la scienco pri la noosfero kunligigas kun la historia enhavo de scienca "socia demokratio".

En naturaj fenomenoj ni devas serĉi la veran "dio"n. La naturo kaj ĝiaj leĝoj estas eternaj, videblaj, kaj fizike senteblaj kun influo je la homo. Neniu povas rompi la leĝojn de naturo. Religia dio estas neperceptebla, nur imaga produkto de individua fantazio.

[1] Blanke, D,; ***Socilingvistikaj aspektoj de la Esperanto-movado***; Budapeŝto, 1978; p. 182-208.

[2] "La detruo de la muroj", ***Hungara Vivo***, n-ro 1, 1988.

*N.d.l.R.: Mi aldonu ke V.I. Vernadskij (1863-1945) ne nur estis ŝlosila sciencisto en la historio de ruslanda kaj sovetia scienco, sed li principe kaj sukcese rezistis kontraŭ Stalin kaj laŭeble protektis sovetiajn sciencistojn kaj sciencon! Mi rekomendas al anglalingvanoj la libron* Science and Russian Culture in an Age of Revolutions *[Scienco kaj Rusa Kulturo en Epoko de Revolucioj] de Kendall E. Bailes (Bloomington: Indiana University Press, 1990.*

## NOVA HUMANISMO KIACELE?

de J. Deker (Maŭricio)

Reference al la artikoloj de A. Ŝalamon (***Ateismo*** 1:1) kaj O. Pavlov (***Ateismo*** 1:3), mi volas ekzameni tiun problemon de humanismo per la lumoj de moderna scienco por distingi tion racian de tio devenanta de religio. Esti ateisto konsistas ne nur el neo de la ekzisto de dio, sed ankaŭ el eltiro de la sekvoj de tiu neekzisto.

Iu nekonato de antikva epoko konsilis ke "Komprenu vin mem" estu gravurata sur la templon en Delfo; tio impresis tiom la filozofon Sokraton (470-399 A.K.) ke li prenis tiun formulon por devizo. La malfeliĉulo ne havis ideon pri kiom da studoj tiu postulo implicas. Feliĉe, ni vivas pli ol du mil jaroj poste en epoko kiam danke al biologio ni jam konas multon pri tiu temo, kaj povas esperi ekkoni pli kaj pli en la estonto. Biologio, kiel scienco de la vivo, meritas studadon se ni volus kompreni ion, ne nur pri nia korpo kaj ties funkciado, sed ankaŭ pri niaj sentoj, nia konduto - unuvorte, nia menso. Ĉion ĉi neniu racia ateisto rajtas ne koni, kiel se oni vivus antaŭ centoj aŭ miloj da jaroj. Per studado de modernaj libroj kaj revuoj pri biologio, ĉiu leganto povus pliriĉigi sian scion pri sia korpo kaj menso kaj ankaŭ pri ĉio vivanta. Pro spacolimo, mi ĉi tie intencas doni nur kelkajn ekzemplojn.

Mi komencas per raporto pri plej konata fenomeno: la problemo de laboro kaj mallaboremo. La laboro estas pli malpli peza sed ĉiam postulas energion, eĉ la mensa laboro. Tiun energion produktas la homa korpo per kompleksaj biokemiaj reakcioj. Necesas bona sano kaj nutraĵo. Sen energio, do nenia vivo, nenia laboro. Tio ne estas surprizo. Sed aliaj faktoroj necesas, kiujn oni eltrovis antaŭ proksimume jarcento. Necesas vitaminoj, el kiuj la plej konata estas vitamino C aŭ askorbata acido. Pro ties manko la pratempaj maristoj suferis skorbuton. Nun estas bone konate, ke oni povas sintezi tiun acidon relative simple. Tio estas ofte bona rimedo kontraŭ laco. Aliaj mankoj de vitaminoj povas kaŭzi laciĝon. Ekzemple, manko de Vitamino $B_1$ kaŭzas beriberon, kiel eltrovis Funk en 1911. La manko de vitamino $B_{12}$ kaŭzas anemion de Biermer. Alia kaŭzo de anemio, en tropikaj regionoj, estas vermetoj kiaj Ankylostomia duodenale, kiuj establiĝas en homaj intestoj.

Sed ekzistas pluaj kaŭzoj de mallaboremo. Depost cent jaroj kiam Claude Bernard eltrovis la glikogenan funkcion de la hepato, pluraj generacioj de biologoj studis la multajn internajn sekreciojn de la glandoj -- t.e. hormonoj. Tiuj hormonoj ne

nur havas gravajn fiziologiajn funkciojn sed ankaŭ agas pri la psika stato. Inter aliaj la hormono tiroida efikas la laborkapablon de homo. Pro nesufiĉo la homo ne kapablas labori, pro tuta manko homo mortas. Ankaŭ kortikasurrena hormono grave influas laborkapablon.

La multaj endokrinologiaj faktoj estas konataj dum pli ol 50 jaroj, sed la funkciado de tiuj glandoj dependas de la kromosomoj. Nun biologio progresas tre rapide, post la genetika kodo, la gena strukturo, oni malkovras biokemiajn fenomenojn, kiuj ebligos estontajn kuracojn por aliaj malvirtoj kiaj ŝtelemo, murdemo, ktp., danke al molekula biologio. Ni estas tre foraj de Moseo kun la ordonoj de Dio, kiuj ne estas tre efikaj kontraŭ la misfunkciado de la homa korpo aŭ menso.

Mi aldonas por Pavlov kaj aliaj ke la produktado ne estas rekta funkcio de la laboremo de homoj. Per modernaj iloj kaj metodoj oni povas produkti multe pli ol per simplaj homaj fortoj. Ekzemple la produktado de kamparano en 1800 estis ekvivalenta al tiu de antikva egipta kamparano: tiu kapablis nutri sep personojn. Nun en Britio 3% de la loĝantaro kapablas nutri la tutan loĝantaron. Kio fiaskis en Sovetunio ne estas la marksisma teorio, sed la nekapablo apliki ĝin praktike. Kial? Ne pro manko de kapitalistoj, sed pro manko de kleruloj, teknikistoj, ktp., kiam okazis la revolucio, al kio aldoniĝas la eraregoj de Stalin kaj de la komunista partio. Sufiĉus kreskigi la produktadon de varoj per raciaj, sciencaj, teknikaj metodoj kaj iom da organizado por prosperigi Sovetunion.

Por konkludi, se oni ekzamenas la problemon racie kaj science, oni konstatas ke la malvirtoj ne estas moralaj aferoj sed biologiaj aŭ genetikaj difektoj. Skiziĝis kelkaj eblaj kaŭzoj de mallaboremo. La kaŭzoj de la ceteraj malvirtoj ankoraŭ ne estas bone komprenataj, sed restas antaŭ ni jarcentoj. Kion ni scias jam, tio mirigus mezepokulojn. Kion niaj pranepoj scios post 500 jaroj, ni ne povas imagi. Molekula biologio eltrovis, ke la diablo de la kristanoj impresis niajn malvirtojn en la kromosomojn pri kiuj Jesuo Kristo ne avertis.

# POEMOJ DE WILLIAM AULD

## AL PASTRO

Vi staras pale ee l´katedro
kaj fablojn knedas
pri dio, kristo, sankta petro;
Cu do vi kredas,
ke homajn korojn tuŝas trafe
viaj vortpafoj?
Pastro! -- vi blekas eĉ pli
ŝafe
ol viaj ŝafoj!

## EVOLUO

Prahom´ Adamo
l´aeron freŝan de l´mateno snufis
ĝis liaj pulmobalgoj plene pufis;
ekprenis sian klaban kverkobranĉon
kaj iris ĉasi sian matenmanĝon.

Sinjoro Braŭn
ĉirkaŭ la gorĝon volvas skarpan lanon
por flegi sian delikatan sanon;
ekprenas sian decan pluvombrelon
kaj iras "gardi por la nokt´ kandelon".

Prahom´ Adamo
la fulmotondron kaj ventegon timis,
kaj ilin kiel diojn li estimis:
li ne komprenis la naturpotencojn,
do antaŭ ili faris riverencojn.

Sinjoro Braŭn
dimanĉe al preĝejo iras orde,
sur benk´ rigida sidas malkomforte:
sed ne plu kredas la koleron dian,
kaj krizon timas nur ekonomian.

*Ĉi tiuj poemoj aperas kun permeso de la aŭtoro, kiu varme aprobas la laboron de ATEO.*

# OBSKURAJ RADIKOJ DE LA "NOVA EPOKO"

de Roland Schnell (Germanio)

La honoran titolon "Ĉefurbo de la movado" la germanaj faŝistoj atribuis al la bavara urbo Munkeno (München), kie ekfloris la nazia movado en la 20-aj jaroj de nia jarcento. Aktuale en ĉi tiu urbo viglas alia movado: ekzistas proksimume 100 esoteraj centroj, institutoj, kaj organizoj akurate listigataj en revuo, kiu havas la signifoplenan titolon ***Lichtblick — Spirita Revuo por Munkeno kaj Bavario.*** Troveblas Balkriŝan-, Surat Shabd aŭ Abaton-Centro, same kiel Kensoh-, Korak-, Janus- aŭ Theta-Instituto, oraklo-metiejo, tantra alĥemio, diversaj institutoj por spirita resanigo, reenkarniĝa terapio. Terminoj plej ofte anglaj estas uzataj, ekz. Reiki, Aura-Reading, Mind-Clearing, Pulsation aŭ Wing-Song, laboro je la "Chakren", je la "Plej Alta Memeco", je la energicentralo subkonscio, kontakto kun mortintoj aŭ gardospiritoj, neidentigitaj flugobjektoj kaj eksterteraj estaĵoj, evoluo de parapsikologiaj kapabloj per helpo de kristaloj, pendoloj, divenaj vergoj, per astrologio, numerologio, klarvido, taroto, kabalo aŭ runoj.

Kion precize signifas ĉi tiu miksaĵo, kiu ĝenerale aperas sub la etiketo "Nova Epoko" (New Age) aŭ lastatempe "Luma Epoko" (Light Age)? Ĉu la tuto nur estas sensencaĵo, kiu ne indas pritrakton, aŭ ĉu necesas serioza pristudo de ĉi tiu movado precipe pro ĝia strategio stultigi la amasojn? La tiel nomata "nova pensmaniero" atingis timendan amplekson: proksimume 20% de novaj libroj eldonitaj dum la lastaj jaroj estas en kategorio "Nova Epoko" kaj esotero — kaj la nombro ankoraŭ kreskas. Oni ofertas kursojn eĉ en popolaj altlernejoj.

Kio do estas la ideologio, kiu estas prezentata al la popolo sub etikedoj kiaj "Kosma Konscio" aŭ "Nova Epoko"? La adeptoj de la Nova Epoko sin komprenas kiel avangardon de tute nova, neniam antaŭe ekzistinta pensmaniero. Sendepende de la fakto, ke utopiaj projektoj pri iu nova epoko estas troveblaj en la mitoj de ĉiuj popoloj sur la terglobo, la ideoj, kunmetataj en "nova epoko" tute ne estas

novaj aŭ originalaj. Ĉefe ili devenas el ideario de la "teozofio", miksaĵo el ŝajne raciaj kun mistikaj, okultaj scioj, troveblaj je la novplatonanoj (2-a ĝis 6-a jarcento de nia epoko) kaj precipe en la kristana "gnostiko", kiu estis influata de ili.

Teozofiaj ideoj estas rimarkeblaj tra la tuta mezepoko ĝis nia tempo kaj speciale aperis fine de la 18-a jarcento en la verkoj de la t.n. "spiritistoj", kiuj ĉefe celis al la kontakto kun la animoj de mortintoj. Kiel kontraŭa movado al la revoluciaj ŝanĝoj en la eŭropa socio la spiritismo atingis sian kulminon fine de la 19-a jarcento. Ĉie aperis memfaritaj mediumoj, kiuj transdonis mesaĝojn el la transejo; okazis seancoj kun tablomoviĝo kaj rigardado en la kristalan globon. "Recidivo en la primitivan superstiĉon" juĝis Friedrich Engels en publikaĵo el la jaro 1878.

SEKRETA DOKTRINO

En la jaro 1888 publikiĝis Helena Blavatsky, denaske rusa, sian fundamentan teozofian verkon ***La Sekreta Doktrino***, kiu estis sendata al ŝi en spiritisma maniero de nevideblaj himalajaj spiritoj. Ĉi tiu kunmetaĵo el orientaj kaj okcidentaj esoteraj tradicioj, miksita kun evoluismaj kaj aristokrataj teorioj pri la deveno de la homo, rapide iĝis la baza verko de la eŭropa okultismo. Preskaŭ ĉiuj postaj verkoj de la teozofio kaj nuntempe la "nova epoko" estas maksimume variantoj de la jena mondkoncepto: en certa loko en Himalajo troviĝas la surtera kontaktejo de la "Granda Blanka Kongregacio", loĝio de lumigitaj majstroj al kiuj apartenas krom Kriŝno, Budho, kaj Jesuo Kristo, inter alie Sankta Francisko de Asisi, Leonardo da Vinci kaj Johann Wolfgang von Goethe.

La kongregacio servas al al galaksia hierarkio, kiu sekrete observas la vivon de la homoj sur la tero, kaj kiu ricevis meze de la 19-a jarcento la ordonon gvidi la homaron en "Oran Epokon". La necesaj esoteraj sekretoj estas malkaŝataj al ĉiuj homoj, kiuj pretas kiel "lumagantoj" realigi la novan mondordon.

La elektitaj homoj devas servi kiel mediumoj por la mesaĝoj de la majstroj, leviĝintaj en nirvanon. La realigo de la "nova epoko" estas privilegio de la plej progresinta raso: la arjoj. Tial la formorto de la subaj rasoj (indianoj, papuoj, eskimoj, aŭstraloj) estas karma neceso.

La ekstreme dekstra "Teozofia Societo", fondita en 1875 de Helena Blavatsky en Novjorko, liveris kun tiuspecaj rasismaj ideologioj la volonte akceptatan apologion por la amasmurdoj fare de imperiismo en la Tria kaj la Kvara Mondo. Je la komenco de la 20-a jarcento, la Teozofia Societo, kiu intertempe ŝanĝis sian nomon al "Adyar TG", havis loĝiojn kun pli ol 100 000 membroj en proksimume 50 landoj kaj rimarkindan politikan influon. En la jaro 1907 Annie Besant, disĉiplo de Blavatsky, iĝis prezidantino de la societo, kiu ekde nun spertis imponan prosperon. Komisiita de la "Commonwealth" [brita imperio], ŝi transprenis la prezidon de la hinda nacia kongreso, kie ŝi baldaŭ ekkverelis kun Gandhi pro ŝia teozofia doktrino pri rasoj, el kiu ŝi divenis la konservadon de la kastoj.

ANTROPOZOFIO

Alia pioniro de la nuntempa "Nova Epoko" estas Rudolf Steiner, kiu komencis sian esoteran karieron kiel ĝenerala sekretario de "Adyar TG" en Germanio. Li forlasis la organizon en la jaro 1913, ĉar li ne pretis partopreni la kulton, postulata de Annie Besant, por prezenti Jiddu Krishnamurti kiel novan kriston. Steiner fondis "Antropozofian Societon", kiu enmetis diversajn sociajn kaj humanismajn elementojn en la teozofian doktrinon, sed li konservis la ideologion de la supereco de la germana-norda raso.

Krom Steiner menciindas precipe Annie Alice Bailey, kiu aliĝis en 1915 al la kalifornia loĝio de Adyar TG. Kiel mediumo ŝi ricevis personajn mesaĝojn de la Granda Blanka Kongregacio. Ŝi plilongigis la membroliston per kelkaj pluaj lumigitaj personoj: Napoleon, Bismarck, Mussolini, Hitler, Stalin, kaj Franco. La reakcia interpreto de la doktrino pri la karmo atingis sian kulminon: socia

mizero ĉiukaze estas kaŭzata de kulpoj en antaŭaj vivoj. La amasmurdo fare de la Tria Regno estis, ec poste, pravigita: la juda gento estis devigata perlabori sian malfavoran karmon, kaj la nazioj nur helpis al ili.

LA TRIA REGNO

La nazioj siaflanke evidente montris grandan intereson pri la teozofia elita doktrino pri rasoj. En Germanio kuniĝis reakciaj grupoj el la industrio, nobeloj, kaj oficiroj jam en la respublika periodo inter 1918 kaj 1933 en sekretaj loĝioj, kiuj celis kaj al la detruo de la juna demokratio kaj al la realigo de arja epoko. La plej grava grupo estis la Tuleo-ordeno, fondita en 1918 en Munkeno, al kiu apartenis poste eminentaj nazioj, ekzemple Hesse, Rosenberg, kaj Himmler (kiu sin komprenis kiel reenkarniĝon de Henriko la Leono. La Tuleoanoj revis, ke purrasaj arjaj superhomoj regu la mondon. La komencon de la arje-spirita nova epoko ankoraŭ malhelpis la mallumaj rasoj (judoj, nigruloj, ciganoj), kiuj tial estus forigendaj. La mesio de la nova epoko estu Hitler. Tutcerte la naziismo interalie radikis en teozofiaj doktrinoj.

LA NOVA EPOKO AKTUALE

Trompitaj estas tiuj kiuj pensis, ke post la finigo de la nazia barbareco ankaŭ la teozofiaj fantomoj estus forpelataj. Ekde la 70-aj jaroj ĉi tiuj doktrinoj spertas renesancon; transcendecaĵoj ĝuas florantan konjunkturon.

Nekredeblaj stultaĵoj, ekzemple de Shirley MacLaine, de Chris Grishcom, Joseph Murphy aŭ Thorwald Dethlefsen pri la kontaktoj kun spiritaj estaĵoj aŭ kun plej alta memeco ("channeling" = kanalumado) aperas en specialaj esoteraj serioj de grandaj kaj renomaj eldonistoj. Ili estas milionoble aĉetataj.

En preskaŭ ĉiun sferon de la socia vivo la novepoka idearo povis enpenetri. Precipe la tiel nomata psiko-scenejo estas subfosata. Rimarkeblas la granda nombro de esotere orientataj kuracejoj. Tre ofte estas aplikataj efikegaj do riskaj psikaj tek-

nikoj, kiuj povas kaŭzi fatalajn sekvojn en la manoj de nespertaj terapeŭtoj. La plej multaj novepokaj terapeŭtoj gajnis nenian kvalifikigan edukon. Ili agas en jure nedifinita regiono, kiu permesas al ĉiuj uzi la titolon "psikoterapeŭto". Kio okazas sub la etikedo "spirita terapio" kutime estas harstariga sensencaĵo.

Ankaŭ la ekologian movadon influis la esotero. Oni provas kunveni en "Lokoj de Forto", kie oni surscenigas pseŭdoŝamanajn ritojn por efektivigi la "Repacigon kun la Patrino Tero". Trafe-maltrafe oni ekspluatas la tradiciojn de ĉiuj kulturoj: keltaj kaj ĝermanaj tradicioj same kiel indianaj kaj tibetaj. Nur gravas, ke la tuto havu iom da mistika aspekto kaj ke la unuopulo sin povas imagi "parto de la tutaĵo". La limo inter tio kaj la ideologio de "sango kaj grundo" de la nazioj estas malfacile rekonebla.

Eĉ la feministinoj emas al "New Age": la novaj sorĉistinoj (J. Jannenberg) havas same banalan kaj agreseman doktrinon, kiu prezentas la virinojn kiel la principe pli alte evoluintan homan estaĵon.

Ankaŭ la "Granda Blanka Kongregacio" ŝanĝiĝis: aktuale eĉ indianaj tribestroj, mortintaj kompreneble, ĝuas la honoron. El kosmaj aferoj sin anoncas la irokezo "Blanka Aglo", kies ege reakciaj mesaĝoj intertempe plenigas kelkajn librojn. Ekzemple li diras: "saĝa homo neniel maltrankviliĝas; li scias ke la dia leĝo stas justa, perfekta, kaj vera, kaj ke ĝi regas ĉiujn erojn de la homa vivo. Ne plendu kaj ne estu malkontenta pri via sorto. Kiam vi lernos akcepti vian karmon, ĉar vi lernis ke nur per tio vi povas venki, vi vivos pli facile kaj pli feliĉe."

La spiritaj mesaĝoj de "Blanka Aglo" estas libroforme same bone vendebla kiel la skribaĵoj de Charles W. Leadbeater, kiu deklaras la formorton de la indiĝenaj popoloj kiel karman neceson, ĉar ni kiel pli alte evoluintaj animoj transpasis ilin.

Kompreneble la homaro ricevis ankaŭ la atombombon de la Granda Blanka Kongregacio kiel donacon

por batali kontraŭ la malbono. Ĝi estu nepre necese por la konstruado de nova monda ordo, en kiu la arja raso regos. G. Trevelyan en Findhorn diris en 1983: "Post nuklea milito la tero povos renaskiĝi en nova beleco kaj homaj animoj povos malsupreniri, esti fekunda kaj plimultiĝi."

La aktualaj reprezentantoj de la "Nova Pensmaniero" konservas kaj daŭrigas la reakcian ideologion de la teozofoj. Kompreneble ili ne rekte propagandas la ekspluatadon de la popoloj en la Tria kaj Kvara Mondo. Ili ne laŭte diras ke la mizeraj kvartaloj estas la lokoj kie amasiĝas malsupraj animoj kaj tie nur estas juste traktataj. La rasismo, antisemitismo, faŝismo restas kaŝita. Nur de tempo al tempo oni ekscias pri la vera spirito, kiu situas malantaŭ la senkulpa fasado de fumbastonetoj kaj meditado.

En aŭstria televidelsendo la novepoka guruo Erhard Freitag konfesis, ke la 6 milionoj da judoj kiuj estis mortigitaj en germanaj koncentrejoj nur pentis pro pekoj en pli fruaj vivoj. Similan teorion prezentis Rainer Holbe, parolanto de Luksemburga radiostacio RTL, komence de la jaro 1990 en libro kiu aperis ĉe la granda eldonejo Knaur kaj kiu estis diktita al li de du spiritaj estaĵoj.

Nu, la terapiejo de Freitag en Munkeno intertempe estas fermita, Holbe perdis sian postenon, sed multaj aliaj povas sub la pretendo de "spirita serĉado por lumo kaj amo" daŭrigi sian reakcian, se ne diri faŝisman, entreprenon de la stultigo de la homoj.

TERMINOLOGIAJ RIMARKIGOJ: La redaktintoj de PIV evidente ne konsciis pri la reakcia esenco de la teozofio, ĉar ili erare klarigas, ke temas pri "sinkretisma doktrino, celanta per neraciaj intuaj procedoj havigi scion pri Dio kaj vivsignifo kaj elvolviĝon de metapsikaj kapabloj; ĝi ankaŭ predikas, same kiel la Zamenhofa homaranismo, la universalan, homaran fratecon sen distingo pri religio, kredo, sekso aŭ raso." La termino "antropozofio" ankoraŭ ne troviĝas en PIV, sed per la prefikso

"antrop" ĝi estas facile kreebla el "teozofio" paralele al la historia evoluo.

*POSTKOMENTO DE R. DUMAIN: Koran dankon al S-ro Schnell pro ĉi tiu majstroverko. Ĉefa celo de mia intelekta agado dum la pasinta jardeko estas montri la faŝismajn radikojn de novepokaj ideoj de la usona "kontraŭkulturo" de la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj. S-ro Schnell jene konfirmas mian projekton.*

*La novepoka ideologio estas trompa, eskapisma, malrespondeca, memkontenta, etburĝa ideologio. Jes, mi konatiĝis kun komfortaj etburĝuloj kiuj asertis, ke la negroj suferas mizeron en la gettoj pro ilia malbona karmo. Ekzistis famaj blankulaj mediumoj kiuj ricevis rasismajn mesaĝojn de la transmondo. Estas nun meze de Usono faŝista kulto de la "Granda Blanka Kongregacio" kiu posedas bienon ĉe kiu oni konstruas ŝirmujojn kaj stokas armilojn prepare al atombomba mondmilita Armagedono, timante atakon eĉ dum la epoko de glasnosto kaj perestrojko.*

*Ne surprizas min ke etburĝaj verduloj kaj feministoj akceptas la supre priskribitajn okultismajn ideaĉojn. Mi ĉiam avertis: gratu la haŭton de socialdemokraton kaj sube vi nepre trovos faŝiston.*

*Similajn stultaĵojn oni devas kontraŭbatali en Esperantujo. Rigardu mian polemikon kontraŭ Albert Goodheir:* "Kontraŭ Obskurantismo en la Belartaj Konkursoj", *en* **La Kancerkliniko**, *n-ro 54, aprilo-junio 1990, p. 21-22.*

## ANTISEMITISMO KAJ ERASMO

de Elliot L. Jurist
tradukis R. Dumain

*N.d.l.R.: Mia kritiko "Mallaŭdo de Stulteco" pri la eldonita Esperantlingva traduko de la fama libro de Erasmo aperis en* La Kancerkliniko *kaj estis universale kondamnita. Mi malfavore komparis Erasmon kiel "humaniston" al la sekulara judo Spinoza, kies pli larĝa perspektivo daŭras ankaŭ per nia kara D-ro Zamenhof. Nu, tiuj kiuj taksas min frenezulo*

*pro kondamno de ĉefverko de eŭropa kulturo, legu plu.*

"Se esti kristano signifas malamon kontraŭ judoj, do ni ĉiuj estas rimarkindaj kristanoj."

-- letero de Erasmo, 1519.08.11

La libro ***Erasmus and the Jews*** [Erasmo kaj la Judoj] de Shimon Markish (University of Chicago Press, 1986, 203 p., $25) prezentas gravajn kaj urĝajn demandojn pri antisemitismo. Mi devis repensi propran pensaron pri antisemitismo, kvankam mi malkonsentas la perspektivon de Markish.

Estas kelkaj rimarkindaj faktoj pri Markish. Unue, Shimon estas la filo de Peretz Markish, unu el la plej eminentaj sovetiaj jidaj verkistoj, murdita je ordono de Stalin je 1952.08.12. Due, Markish verkis ĉi tiun libron post elmigro de Sovetunio .... Markish lamentas ke la juda komunumo silentis post apero de la unua eldono de ĉi tiu libro en Francio ....

La tezo de la aŭtoro estas, ke Erasmo ne estis antisemitisma kaj reprezentas paŝon en la direkto de reala tolerado malgraŭ kelkaj judofobiaj esprimaĵoj.

Kvankam Markish senkulpigas Erasmon pri antisemitismo, li ja kulpigas lin pri "kontraŭ-Mose-ismo" kaj "kontraŭ-judaismo". Kontraŭ-Moseismo implicas opozicion al la leĝaro kiel la ĉefan enhavon de religio. Ĝi devenis de la Paŭlisma vidpunkto kiu subtenis la kristanan vidpunkton pri la spirito de la leĝaro kontraŭ la supozata judaisma emfazo de la laŭlitereco de la leĝaro. Kontraŭ-judaismo implicas negativan sintenon pri la juda religio. Tion promociis la Aŭgustina tradicio kiu kulpigas la judojn pro la krimo de di-murdo. Ambaŭ kontraŭaĵoj temas pri la juda religio, malsame al antisemitismo kiu celas realajn homojn....

Markish asertas ke Erasmo "neniel interesiĝis pri judoj." Erasmo senkritike adoptis la norman

vidpunkton ke judaismo kaj kristanismo estas esence neakordebla. Do, kristanismo estas supera kaj oni povas ignori judaismon. Lin koncernis la dangero de la infekto de kristanismo per "nova judaismo". Ĉi tio signifas ne kreskon de judaismo mem sed emon de kristanismo kiu jam fariĝis tro riteca en la skolastika epoko. Kiel antaŭulo de la Reformacio, Erasmo deziris revenon de kristanismo al ties radikoj: la Evangelioj kaj pli simpla formo de fido.

Erasmo estis kunfondinto de Collegium Trilingue, kie oni studis la fontlingvojn grekan, latinan, kaj hebrean. Oni taksis la Malnovan Testamenton studinda, kvankam laŭ Markish, Erasmus ne ellernis la hebrean sed tamen kritikis Aŭgustine pro ties interpretado de la Malnova Testamento sen koni la lingvon. Erasmo havis kontraŭdirajn emociojn pri la hebrea lingvo, fojfoje kondamnante la "barbaran" karakteron de la hebrea.

Markish subtenas la tradician vidpunkton ke Erasmo apartenas al tolerema nordrenesanca humanismo. Prezentiĝas ekzemploj ke Erasmo superis vulgarajn antaŭjuĝojn: "Mi povus eĉ ami judon, se tiu nur estus bonkondukta kaj amikeca kaj ne blasfemus kontraŭ Kristo antaŭ mi"; "Aktuale la judoj subordiĝas al la kristanoj, la pli aĝa popolo servas la pli junan, sed ne ĉiuj judoj estas damnitaj kaj ne ĉiuj kristanoj savitaj."

Erasmo ankaŭ firme opoziciis kontraŭ deviga konvertado; tamen, zorga inspekto de lia vidpunkto estas instrua. Li kontraŭis al deviga konvertado parte pro sia morala sindono al toleremo kaj parte pro timo promocii devigan, hipokritan kristanismon. Tamen, konsideru la fakton, ke Erasmo provokas judojn pro malemo konvertiĝi: "Kion vi havas diri, malfeliĉa judo? Vi konstatas ke Dio polvigis ĉiujn viajn planojn. Ĉu vi konstatas ke ĉia via friponado falis sur vian propran kapon? Ĉu vi vidas, ke vi falis en la truon kiun vi fosis por aliaj? Vi vidas, ke la Templo estas fordetruita senspure, ke via religio forflagretis, ke pastroj, leĝoj, ŝtatoj, urboj, homoj, lando ĉiuj malaperis, ke nenio restas krom manpleno de vagantoj kaj ekzilitoj, spektantoj al antaŭa frenezo kaj antaŭaj malfeliĉoj

.... Jen, malfeliĉa judo, tiu senkulpa sango kiun vi faligis sur viajn kapojn kaj la kapojn de viaj idoj. Jen via Reĝo Cezaro, kiun vi preferis ol Kristo! Kaj ankoraŭ vi ne saĝiĝas kaj ne volas agnoski vian blindecon. Ankoraŭ vi elspiras malamon al la Reĝo de la Judoj, kiun ni adoras."

Alia ekzemplo same ĉagrenas: "Ni lertas dresi sovaĝajn kaj timemajn bestojn, por plezuro aŭ por utilo, do ĉu ni ne povas dresi ilin servi Kriston? ... Mi scias ke oni apenaŭ povas trovi beston pli nedreseblan ol obstinan judon kaj persistan herezulon, sed finfine ekzistas nenia besto tiom sovaĝa ke ĝi ne mildiĝas per afableco kaj karesado." Klare, apogo de Erasmo al toleremo, estis, kiel Markish konfesas, "ankoraŭ malproksima de religia tolerado en la moderna senco." Oni atentu la problemon de toleremo, ĉar ŝajnas ke toleremo estis privilegio nur por kristanoj, dum oni kondamnis judojn pro persisto resti judoj.

Malgraŭ simpatio al Erasmo, Markish dokumentas plurajn judofobajn esprimojn de Erasmo. Mi mencios nur la plej signifoplenan. En fama disputo inter Johannes Pfefferkorn, kovertito el judaismo kies libro proponis subpremon de la Talmudo, kaj Johann Reuchlin, Hebreo-fakulo kiu argumentis ke la Talmudo estas konsekvenca kun kristanismo, Erasmo rifuzis esti partizano. Tamen, en pluraj leteroj Erasmo kondamnas Pfefferkorn kiel judon, malgraŭ ties konvertiĝo. "Mi ĵuras, ke se vi malfermus lin, vi trovus en lia sino ne unu sed miljudojn." T.e., iam judo, ĉiam judo. Do, judoj estas kondemnendaj ne nur kiam ili rifuzas konvertiĝi sed eĉ kiam ili jes estas konvertitaj. Markish donas ĉiujn faktojn pri judofobio de Erasmo sed ne eksplikas, kial ili ne konsistigas antisemitismon ....

La karaktero de antisemitismo estas la kruca demando. Markish konkludas ke Erasmo estas antisemitisma maksimume en "teologia kaj abstrakta" senco kontraste al "politika kaj konkreta." Do, tia varianto de antisemitismo estas tradicia kaj relative sendanĝera. Distingon inter teoria kaj praktika antisemitismo sekvas distingo inter ideoj kaj agoj.

Fine, Markish aldonas alian varianton: "popola antisemitismo", pri kiu Erasmo kulpas kelkfoje sed ne ĝenerale. Markish trivialigas unu ekzemplon kiel nur porokazan, kutiman polemikan esprimon kian oni trovus je surstrata argumento. La kriterio de Markish devenas de mondbildo kaj normo fremda al ni.

La postparolo de la libro, verkita de Arthur A. Cohen, traktas la soveti-judan devenon de Markish kaj diras cetere ke la efektiva antisemitisto estas nur tiu kiu pafos. Cohen ligas Erasmon al "granda tradicio de malamo" kiu eventuale rezultiĝis la Holokaŭston.

Sed la distingo de Markish inter mildaj kaj danĝeraj variantoj de antisemitismo estas problema, ĉar mankas klarigo pri la rilato inter la du. Ĉu la danĝera varianto eblas sen la milda; ĉu la milda emas iĝi la dangera? Tamen, la distingoj de Markish kaj ties aserto, ke finfine Erasmo ne estis antisemitisma, estas iom kredindaj.

Oni notu emon taksi antisemitismon monoliteca kaj ignori ĝian historion kaj ke ĝi havas diversajn formojn kaj ne ĉiuj ekvivalentas al genocido. Grava fakto estas ke la termino "antisemitismo" unue aperis en la programo de politikaj partioj en Germanio en la 1870oj. Antisemitismo aperis kiel reakcio al la gajnoj de judoj post la "Iluminiĝo" kaj fortikiĝis per kvazaŭ-biologia teorio de rasaj diferencoj. Ĉi tiuj unuaj antisemitistoj fieris proklami malamon kontraŭ la "semita raso". Scienca rasismo aldonas novan dimension kaj montras la vojon al genocido efektivigebla per teknologio .... Sed ĉu ĉi tiu pli venenega varianto de antisemitismo povus sukcesi se la Eklezio ne jam preparis la vojon per perista malamo al judoj?

...... "Kontraŭ-judeco" estas pli bona termino [ol antisemitismo]. Ĝi estas pli larĝa koncepto ol "kontraŭ-judaismo" kaj ne ekskludas judojn kiuj sentas sin parto de popolo sed ne praktikas judaismon.

Erasmo ja ŝajnas kulpa pri kontraŭjudeco, eĉ se oni dubas pri antisemitismo. Erasmo ne estis dedicita malamiko kontraŭ judoj. Lia sinteno estis kontraŭdira .... La kontraudiroj de la epoko de Humanismo reaperas en la epoko de Iluminiĝo. Ambigua sinteno preferindas ol senbrida malamo. Tamen ĝenas la mallumaj flankoj de eĉ la "progresemaj" movadoj en la pensado de Eŭropo.

[Ĉi tiu artikolo aperis en ***Jewish Currents*** (Judaj Fluoj), marto 1991, p. 32-35. Ĉi tiu revuo promocias socian justecon, sekularismon, kaj la heredaĵon de juda kaj jida kulturo.]

## PRETER LA KREDA BANALAĴO: DU ANGLALINGVAJ LIBROJ RECENZITAJ


de Dan O'Hara
tradukis Peter Danning (Britio)

***Kio estas la Biblio?*** kaj ***Ĉu Dio Ekzistas*** (eldonitaj de Rationalist Press Association, Londono, po £4,50) estas du novaj broŝuritaj libroj da po iom pli ol cent paĝoj. Ilin verkis Carl Lofmark, profesoro de la germana lingvo ĉe filio St. Davids de la Universitato Kimrujo en Lampeter. La stilo estas tre klara kaj komprenebla, ŝajne destinata precipe al inteligenta, scivolema junulo, kiu ekdubis pri la bazo de jud-kristana diismo. Sed ili vere gravas preter tio, ĉar ili ja estas la plej bonaj, mallongaj, kritikaj aprezoj de siaj temoj, kiujn oni povas nuntempe akiri.

Por legantoj je ajna aĝo, ĉi tiuj libroj nekompareble valoros kiel enkonduko por tiuj, kiuj deziras esplori preter kredaj banalaĵoj kaj serĉas racian enketon pri du el la tri fundamentoj de kristanismo: kredo je Dio, kaj la autoritateco de la Biblio. Ni esperu, ke post nelonge, la eldonejo eldonos libron pri la tria kristana fundamento: la Eklezio. Intertempe, ĉi tiuj du libroj de Prof-o Lofmark nepre estas rekomendendaj.

[Ĉi tiu recenzo originale aperis anglalingve en ***Gay and Lesbian Humanist***, vintra numero 1990/91.]

# EL NIA LETERKESTO



Kara amiko, vian laboron por ATEO kaj ankaŭ por *Ateismo* necesas aprezi, ĉar ĝi unuigas la samideanojn en la tuta mondo; tio estas neniel kompensebla. Imagu: je unu fojo vi alparolas ATEO-anojn en ĉiuj mondpartoj; vi disvastigadas informojn kiuj restus sekretigitaj, ĉar miloj da kilometroj apartigas nin.

Ĉu viaj malfacilaĵoj [menciitaj en *Ateismo* 2:2(6)] estas kunigataj kun via ATEO-agado? Ĉu premas vin, dorse kontraŭ la muro, iuj religiaj organizoj aŭ unuopuloj?

Mi devis demandi, ĉar tiu ĉi problemo baldaŭ fariĝos aktuala ankaŭ en mia lando, laŭ mia opinio. Mia antaŭsento povas esti erara, sed malantaŭ la belaj vortoj de proklamata kristana kompreno pendas akra klerikala glavo de miskompreno danĝere balancanta super la kapoj de senkredantaro. Mi konjektas, ke "anĝeloj" baldaŭ elpuŝos siajn kornetojn.

En la kazo de E.K. en Ĉeĥoslovakio [*Ateismo* 2:2(6)] dume temas pri tre subtila teroro -- pli bone diri, ke temas pri elvokado de malcerteco je E.K., por ke li devu almenaŭ okupadi siajn internajn emociojn, pensojn aŭ antaŭtimojn.

-- V.T. (Ĉeĥoslovakio)

*La miaj problemoj aluditaj temas pri personaj cirkonstancoj kiuj havas nenian rilaton kun mia ateisma agado. Mi ja spertas problemojn pro religio, sed min ĝenas ne religiuloj, sed kapitalistoj. En nia socio, senkonsidere de religiaj aferoj, regnas etoso de psika terorismo.*

Laŭ mi ekzistas nur diferenco de sinteno inter ateistoj kaj religiuloj. Oni devas ja elekti unu el du sintenoj. Aŭ oni apartenas al la skolo kies sinteno estas ke ĉio okazis/as hazarde, aŭ oni apartenas al la skolo kies sinteno estas ke ĉio estas planit/ata. Mi longe vivis sen elekti unu el la du sintenoj. Mia multjara sinteno estis ke ĉi tiuj argumentoj estas nesciataj kaj nescieblaj. Jes, estas tria sinteno, sed ĝi ekvilibras ja nur inter la aliaj du. Baldaŭ aŭ pli malfrue oni devas fali sur unu el la du flankoj.

Do, tiu kiu havas la sintenon ke ĉio okazas hazarde devas kapabli kredi ke se mi havus grandan kestplenon de nenumeritaj individuaj skribleteroj, majusklaj, minusklaj, kaj interpunkciaj signoj, kaj se mi forte kaj senorde ĵetus ilin ĉieldirekten, falante ili formus bone ordigitan, legeblan legolibron. Kiom foje laŭ vi mi tion devus fari por atingi tiun rezulton? Kaj eĉ se tiu ago sukcesus, ĝi reprezentus nur etetan parton de la kreitaĵo, ĉar neniu kapablus teni sufiĉe grandan literkeston por reprezenti eĉ unu kvadratcentimetron de marĉaĵo, ne pensu pri tuta kosmo kaj poste ĉiuj kosmoj.

Mia sinteno estas ke ĉio devas esti planita; estante planita iu devis plani la tuton. Ne gravas kiun nomon oni donas al tiu IU, sed li/ŝi/ĝi restas la granda planisto. Ekster tiu diferenco, ateistoj kaj religiuloj havas multon komunan. Ambaŭ diligente pristudas la religion, la unuaj por malpruvi ĝin, la duaj por pruvi ĝin. Ambaŭ tiel faras utilegan agadon ĉar, kiel diris Osiris, Kriŝna, Jesuo kaj aliaj, ege utilas konsciiĝi pri Dio.

— V.P.E. (Kanado)

*Jes, ateistoj kaj religiuloj havas multan komunan. Kiel diris Engels, la unueco de la mondo konsistas en ĝia materieco. Do, malgraŭ ideologiaj diferencoj, ni ĉiuj loĝas en komuna kosmo. Cetere, viaj sofismoj montras la malhonestecon de religia pensado. Oni povas tute konsekvence aserti, ke la kosmo estas nek tute hazarda nek planita afero, sed procedas laŭ internaj naturleĝoj kiuj bezonas nenian eksteran planiston. La universo evoluas per*

*interago de kaj interplektata neceso (naturleĝoj) kaj hazardo. Tiu vidpunkto estas neniel ekzotika nek nepensebla. Ĝi kongruas ne nur kun moderna scienco, sed kun kelkmiloj da jaroj de ĉina filozofio, en kio la koncepto de internaj naturleĝoj (li) sen ekstera dio estas tute natura.*

Mi opinias ke mi estas laŭnature profunda ateista, kiu rapide forlasis la religian edukon, kiun provis doni al mi la gepatroj pro sociaj kaŭzoj kvankam ili mem ne kredis [laŭ propra konfeso]. Ne ĝenus min la religioj se kelkaj iliaj anoj ne provus konstante trudi al aliaj siajn konvinkojn. Ekz. en Francio organizitaj taĉmentoj invadas hospitalojn, difektas materialon kaj malhelpas laŭleĝajn abortigojn. Naŭzegas min la manko de toleremo de fanatikaj religianoj.

-- L.M. (Francio)

Foriginte malnovajn dogmojn, ateisto devas atenti, ke li ne sorbas novajn dogmojn. Pro la okazintaĵoj en kanadaj universitatoj, mi pensas ke samseksemo estas nova dogmo en kiu neniam oni eksplikas la devenon de samseksemuloj en scienca formo. Oni diras nur, "Akceptu! Akceptu!" kvazaŭ tio devenus de iu mistera fonto (Dio?).

Mi bedaŭras la financan staton de ATEO. Tutcerte mi konsentas kun plialtiĝo de kotizo.

-- Pierre Savoie (Kanado)

Mi alte taksas vian laboradon por ***Ateismo.***

-- Alfred Liddle (Skotlando)

Al mi estas nekompreneble ke oni en Kubo rifuzis plialtigon de la abonprezo. Se oni povas partopreni en multkosta kongreso -- por pluraj eĉ la vojaĝkostoj estas tre altaj -- oni certe povus pagi kelkajn guldenojn pliajn. Mi konscias kiom da laboro vi faras por ***Ateismo***; ĝi certe valoras la penon.

-- R.D.J. (Nederlando)

Mi opinias, ke ATEO okupos sin ne per disvastigo de Esperanto inter ateistoj kaj pri disvastigo de ateismo inter esperantistoj. Ĉu poloj [ekz.] bezonas disvastigon de Esperanto: entute NE!, ĉar la lingvo jam vivas en la lando, sed jen ateismo stagnis pro akraj atakoj kontraŭ ateistoj -- sekve, se la organo de nia ATEO estos akceptita por dialogo, tiam ni povos interparoli kun di-kredantoj kaj propagandi ateismon inter esperantistoj. Simila situacio ekzistas en aliaj landoj kaj mia opinio: de Esperanto al ateismo!!!

Ne pravas unuflanke kritiki iun materialon pere de la redaktoro; estus pli bone aperigi neajn kaj jesajn reeĥojn.

Ĉi-jare [1991] sovetianoj festis la Tagon de Kristnasko je la 7-a de januaro -- absurdo, sed nome eks-komunisto B. Jelcin kaj lia teamo anoncis tion por mia respubliko; ankaŭ en aliaj respublikoj oni subtenis lin, sekve mi konstatu, ke la Dio refoje iris al ni. Se antaŭe mi pozitive parolis pri ruslingva revuo ***Scienco kaj Religio***, do nune mi diru malon, ĉar la revuo estiĝis pli religia ol scienca kaj estas pli ŝatata de religiuloj ol ateistoj.

Akraj eventoj en Kjuvejto kaj Litova respubliko ege maltrankviligis la tutan mondon, sekve miaj kaj viaj samlandanoj agadu serioze kaj racie: ili agadu por paco kaj amikeco inter ĉiuj popoloj.

-- Anatolij Surnakin (Sovetunio)

*Lastatempaj eventoj montras ke estas nenia ŝanco por interpopola paco ie ajn en la mondo. La "Nova Mondordo" de George Bush, same kiel la regno de Hitler, estas mondordo de faŝista teroro. Mi nepre publikigas ĉiujn opiniojn senditajn de legantoj. Pri trudo de propraj opinioj, mi ricevas nenian kompenson por mia laboro por ATEO, do mi ekspluatas mian privilegion kiel redaktoro enmeti miajn proprajn reagojn al la artikoloj de aliaj.*

Mi opinias ke liberpensuloj havas racian pensmanieron pri ĉio ĉirkaŭ ni, en proksima kaj malpro-

ksima naturo. Ili do *kredas* je realaj veroj, sciencaj veroj, kiujn oni povas ĉiam denove pruvi per sciencaj metodoj. Kaj nuna granda agadkampo de homaj scioj en naturaj kaj homaj sciencoj ebligas al homoj komplete racian pensmanieron, kiu rilatas *nur parte* al religioj.

Multaj homoj ne disiĝas de tradicia religio, el tradicia kaŭzo, kvankam ili ne estas veraj eklezianoj. Ni ĉiuj scias ke religioj havas tre profundajn radikojn, kun multaj diversaj interesoj. Tial mi opinias ke ne necesas militi kontraŭ religioj; jam necesas ke oni agadu tiel, ke religioj iĝu laŭŝtupece historiaj pasintaĵoj.

Pro tio mi proponas ke la nomo de la organizo ŝanĝiĝu al *Sciencverisma Tutmonda Esperanto-Organizo*, ĉar ĉi tiu nomo donus pli da scienca larĝeco kaj fleksebleco.

Plue, aktualaj sciencoj havas multegan gravecon en la homa vivo, sed religioj bone sin konservas kaj tenas tradiciajn kutimojn kiuj ampleksas tuthoman vivon ekde naskiĝo ĝis morto. Apliko de sciencaj pensoj kaj sciencaj veroj en tradiciaj kutimoj proksimigus kaj unuigus nian tutan mondon, sed tia aplikado ankoraŭ ne komenciĝis.

Por ke ni ekmovu ĉi tiun procezon, mi pensas ke ni bezonus ellabori tri manlibrojn, jene:

(1) konciza rememorilo pri plena historio de sciencaj pensoj;

(2) proponoj por solenaj festadoj de gravaj sciencistoj;

(3) proponoj por solenaj festadoj de personaj okazoj de ĉiu homo, de nasko ĝis morto, sur bazo de scienco-logiko.

Per ĉi tiuj manlibroj ni komencus krei novajn komunsciencajn kutimojn por nuntempa kaj venontaj homaj generacioj.

-- Atanasije Marjanović (Jugoslavio)

*Dankon pro viaj proponoj. Mi ne garantias ke ni povos eldoni manlibrojn, sed ni certe povus aperigi artikolojn pri alternativaj celebroj de gravaj viv-eventoj. Tian agadon jam faras nacilingve pluraj humanistaj organizoj. Kiel novulo vi mistrafis la diskutojn kiuj okazis je la fondo de ATEO. La plejmulto voĉdonis uzi la terminon "ateismo"n por la nomo de nia asocio kaj revuo, do tiu debato estas jam finita. Sed tiam mi argumentis simile al vi, ke la problemaro pri racio kaj mondkonceptoj estas pli larĝa ol la temo de ateismo kaj religio mem, kaj mi sugestis ke oni uzu pli larĝasencan terminon, ekz. "raciismo". Nu, nia membraro insistis pri "ateismo", kaj mi persone ĉiam instigas al la plej vasta konsiderado de mondkonceptaj kaj sociaj problemoj. Do mi solidaras kun via vidpunkto kaj instigas vian pluan partoprenon en ATEO.*

Mi legas ***Ateismon*** ĉiufoje kun granda intereso. Bedaŭrinde vi publikigis laŭ mia opinio ne tre bonan artikolon pri la samseksemuloj. Kaj ili havas sukceson en Ameriko, ĉar ankaŭ vi helpas tiujn ĉi nenormalajn samseksemulojn. Tio tute ne estas natura. Mi tre ŝatas la ateisman movadon en kiu preskaŭ ĉiu homo povas skribi sian opinion. Vi ankaŭ skribas ne pri religiaj aferoj ĉar vi havas tutan alian mondkoncepton. Kial ne estis multaj protestoj al tiaj ĉi artikoloj? Mi deziras bonan estontan sukceson.

-- H.D. (Germanio)

*Dankon pro la bondeziroj. Malgraŭ niaj diversaj opinioj ni devas ĉiam konsideri ateismajn kaj religiajn aferojn en ties tuta socia kunteksto; alie ni limiĝus al tute eksmoda kaj impotenta raciisma propagando malligita de la reala mondo. Oni rajtas diskuti kaj disputi la "naturecon" de samseksemo, laŭ scienca maniero, mi esperas. Sed aparte de tiu konsidero, mi demandas al vi kaj S-ro Savoie, ĉu natura ĉu malnatura la afero, ĉu ne estas socia devo defendi la homajn rajtojn de samseksemuloj kaj protekti ilin kontraŭ persekutado kaj diskriminacio? Tio estas la speco de "akcepto" kiu finfine gravas. Se mi ja povas helpi ilin, mi fiere akceptas vian kulpigon.*



## INTERNACIA ADRESARO

Se via nomo kaj adreso ne aperas ĉi tie kaj vi deziras ties aperon en la venonta suplemento al ĉi tiu adresaro, bonvolu informi la redaktoron. Aperantoj ĉi tie bonvolu sendi laŭbezonojn korektojn. Ĉiuj skribu nomojn kaj adresojn en la latina alfabeto (laŭ angla transskribsistemo se necesas kaj eblas) kaj laŭeble nacilingve.

La ordo de ĉi tiu adresaro estas jena: adresoj listiĝas laŭ lando (landoj en alfabeta ordo laŭ Esperanta nomo), kaj laŭ alfabeta ordo de familia aŭ organiza nomo interne de ĉiu lando. La sola escepto estas la eks-Sovetunio. Ĉi-kaze ĉiuj nomoj grupiĝas kune laŭ alfabeta ordo kaj troviĝas en la listo kie oni trovus "Sovetunio"n, kvankam oni trovos en la adresoj mem la nomojn de la koncernaj respublikoj. Kompreneble, sendante poŝtaĵojn vi devas uzi nacilingvajn landnomojn.

Laŭ mia kutimo, la lasta(j) vorto(j) en nomo estas la familia nomo, sed naciaj kutimoj diferencas, ekz. en hispanaj, ĉinaj, kaj japanaj nomoj. Ĉi-kaze mi laŭeble majuskligis la familian nomon kie ĝi ne sekvas la mian kutimon.

Estas preskaŭ neeble produkti tute konsekvencan adresaron, pro la naciaj diferencoj inter alfabetoj, loknomoj, adresaj kutimoj, ktp. Mi mem konservas ĉi tiun datumbazon en anglalingva, usona formato. Praktike mi povas konverti nur la landnomojn al Esperanta formato. Laŭ usona formato, kutime sed ne ĉiufoje oni trovos ĉi tie la jenan ordon: nomo, strato, urbo, lando. Aliaj landoj, ekz. en orienta Eŭropo, kutimas uzi alian ordon. Por eviti konfuzon mi klopodis majuskligi la urbonomojn, kaj tiel kaj per apudaj poŝtkodoj vi povos kompreni la adresojn.

Will Firth
1 Holder Street
TURNER, A.C.T. 2601
AŬSTRALIO

Jair R. Peixoto Laguna
Caixa Postal, 12871
04092 - SAO PAULO - SP
BRAZILO

Mag. William Auld
20 Harviestoun Road
DOLLAR, Clacks, FK14 7HG
Scotland
BRITIO

S-ro Peter A. Danning
G-f, 68 Church Road
RICHMOND, SY - TW10 6LN
BRITIO

Alfred Liddle
7 Rockwell Crescent
THURSO, Caithness
Scotland KW14 7PL
BRITIO

S-ro Mark Palmer
28 Westfield Road, Caversham
READING, RG4 8HH
BRITIO

John Alan Spencer
30 Adolphus Road
LONDON N4 2AY
BRITIO

Narodno Citaliŝte
Zahari Stojanov Esperanto Klubo
BG-7005 RUSE-5
BULGARIO

S-ro Ljuben Grozdanov
ul. Ars. Jovkov 3-3
BG-1309 SOFIA
BULGARIO

Prof. Ĥristo Marinov
ul. Ami Boue 51
1606 SOFIA
BULGARIO

Josef Kristian
Ruzovy haj 1354
CS-929 01 DUNAJSKA STREDA
ĈEĤOSLOVAKIO

Prof-o Ladislav Podmele
Počernická 86
CS-108 00 PRAHA 10 (PRAGUE)
ĈEĤOSLOVAKIO

S-ro Jiri (Georgo) Rada
Rybalkova 1029, bl. 645-a
CS-434 01 MOST
ĈEĤOSLOVAKIO

Prof. SHEN Chenru
Esperanto-Asocio, Academia Sinica
52 Sanlihe
BEIJING 100864
ĈINIO

André Aude
57 rue des Héraults
F-37550 SAINT AVERTIN
FRANCIO

ATENTU: S-ro Requigny
Federation Esperantiste du Travail
115, rue Béranger
F 92320 CHATILLON
FRANCIO

W. Gilbert
30 rue Croix-Montoire
F-37100 TOURS
FRANCIO

Maurice Merger
1 rue Chénier
F-10800 ST. JULIEN-LES-VILLAS
FRANCIO

S-ino Gemma Rassouw
Chemin de Sainte-Croix
F-84110 VAISON LA ROMAINE
FRANCIO

S-ro Robert Stoffers
Villa Tabou 47, Super-Cassis
F-13260 CASSIS
FRANCIO

Dirk Bindmann
Max-Benkwitz-Str. 34a
DDR-4900 ZEITZ
GERMANIO

Ernst Diedrich
Wismarche Str. 42, F:725
O-2723 WARIN
GERMANIO

Willy Hamann
Siedlerweg 10
DDR-7251 BURKARTSHAIN
GERMANIO

Maria Merla
c-o Lange, Klappacher Str.42
D-6100 DARMSTADT
GERMANIO

Christian Papenmeier
Obere Hauptstrabe 104
DDR-9156 OELSNITZ
GERMANIO

Jiri Proskovec
Heimbaustr. 10
D-4600 DORTMUND 1
GERMANIO

Roland Schnell
Mockernstr. 71
D-1000 BERLIN 61
GERMANIO

Sebastian Sommer
Josef Priller Str. 21, WHG 17
D-8900 AUGSBURG
GERMANIO

S-ro Joan Marimon i Bosch
c-Pere Martell 29, 4rt. D
E-43005 TARRAGONA
Catalunya
HISPANIO

S-ro Francisco Crespo
Candelaria Ruiz del Arbol 37
E-49003 ZAMORA
HISPANIO

Peter Holt
Villa Nicole
Puerto de Soller
07108 MALLORCA, Baleares
HISPANIO

Adonis Gonzales Meana
Apartado 242
33280 GIJON (Asturias)
HISPANIO

Juan Moragues Penella
Pintor Domingo, 2 - 2º
46001 VALENCIA
HISPANIO

Luis Serrano Perez
Font Nova 32
E-08202 SABADELL
(Barcelona)
HISPANIO

Josep Maria Soler
Estape 64 BXS.3
Apartat 166
08190 SANT CUGAT DEL VALLES
HISPANIO

Prof-ino Margit Kishazi
Tanacskoztarsasag ter 78
H-6800 HODMEZOVASARHELY
HUNGARIO

Eva Kramer
Ulaszlo u. 39-41
H-1113 BUDAPEST
HUNGARIO

Peter Nagy
HATVAN
Beke ut. 16
H-3000
HUNGARIO

D-ro Jozsef Pava
Str. Kossuth 60
H-2531 TOKOD
HUNGARIO

D-ro Balazs Szemok
Pozsonyi u. 2
H-2737 CEGLEDBERCEL
HUNGARIO

S-ro Andreo Ŝalamon
Tevat Doar 1050
IL-36 110 KIRJAT TIVON
ISRAELO

S-ro Cvi Ŝolt
Doar-Na Maale-Hagalil
IL-25 130 GAATON
ISRAELO

S-ro Jehoshua Tilleman
40 Ŝivtej-Jisrael-str.
IL-26-275 KIRJAT-ĤAJIM
ISRAELO

Renzo Sommi
Via XXV Aprile n° 40
I-43036 FIDENZA (PR)
ITALIO

D-ro Tosiaki MIZUGUCI
1991-52 Ozenĵi, Asoo-ku
KAUASAKI-ŜI 215
T215
JAPANIO

Martin Lavallee
P.O. Box 126
Succursale Beaubien
MONTRÉAL, Québec H2G 3C8
KANADO

Cleve (Klivo) Lendon
920 Dynes Road, #57
OTTAWA, Ontario K2C 0G8
KANADO

S-ro Pierre Savoie
22-B Harris Ave.
TORONTO, Ontario M4C 1P4
KANADO

Vilhelmo Vanlenho
RR 3 Cookshire
Québec J0B 1M0
KANADO

Orlando RAOLA Gonzales
Longa 220, apt. 5, Mantilla
13800 LA HABANA
KUBO

Jean Dequaire
Royal Road
Arsenal Terre Rouge
MAÜRICIO (MAURITIUS)

S-ino Rejna de Jong
Tomatenstraat 5
NL-2321 HC LEIDEN
NEDERLANDO

S-ro Jerzy Czarnohorski
ul. Orzeszkowej 10-38
PL-43-100 TYCHY
POLLANDO

Tomasz Jan Kudrewicz
str. Marcinkowskiego nr9 m.13
PL-85-056 BYDGOSZCZ
POLLANDO

Valdemar & Izabella Nowakowska
ul. Szymanowskiego 2-12
PL-75-546 KOSZALIN
POLLANDO

Ireneusz M. Smolewski
P.O. Box 3
PL-25-955 KIELCE 15
POLLANDO

Marian Zdankowski
ul. Pana Tadeusza 15-69
PL-10-461 OLSZTYN
POLLANDO

Irina Kosovskih
Lenin str., 182, ap. 23
KATAJSK, 641700
RUSIO (eks-Sovetunio)

Antanas Ramonas
235030 KEDAINIAI
a.d. 15
LITOVIO (eks-Sovetunio)

S-ro Eduardo Raus
TALLINN 21
ESTONIO (eks-Sovetunio)
200021

Naum I. Sigal
ul. Kirova 52, KV. 25
SU-270011 ODESSA
UKRAINIO (eks-Sovetunio)

Anatolij Surnakin
ul. Ferganskaja 11-1 kv. 150
109444 MOSCOW (Moskvo)
RUSIO (eks-Sovetunio)

S-ro Sergio R. Docal
300 East Acre Drive
PLANTATION FL 33317-2643
USONO

Zane Gilstrap
6426 Valley View Street, #54
JOSHUA TREE, CA 92252
USONO

Jack & Minerva Massen
1525-A Day Avenue
SAN MATEO, CA 94403-1608
USONO

Ben Perry
422 W. Upsal Street
PHILADELPHIA, PA 19119
USONO

# KIEL PAGI LA ABONKOTIZON AL ATEO

1. **Sendu US $12 rekte al Usono.** Tiel vi rekte helpos subvencii ***Ateismon***. Ni bonvenigas monon mem sed estas via grava risko ke mono perdiĝus en la poŝto. Elektronika transdono de mono interlande estas kutime tro multkoste ambaŭflanke. Ĉekoj **devas** esti en usona valuto. Skribu ĉekojn kaj bankmandatojn al "A.T.E.O." aŭ "Ralph Dumain" kaj sendu al: **Ralph Dumain**; 1629 Columbia Road, N.W., Apt. 615; WASHINGTON, D.C. 20009-3651; Usono.

2. **Sendu la ekvivalenton de 25 gld. al via landa peranto** se tiu ekzistas. Prefereblas ĉi tiu metodo ol #3 (sube), ĉar ĉi tiel nur la peranto devas zorgi pri translandaj bankkostoj. Perantoj listiĝas sur la interna antaŭkovrilo. Ni bezonas **perantojn** de pluaj landoj do atendas proponojn.

3. **Sendu la sumon de 25 guldenoj (gld.) al Universala Esperanto-Asocio (UEA) aŭ ties banko.** Nia konto te UEA estas ATEO-Y. Nepre sciigu UEA ke vi pagas la abonon de ***Ateismo*** kaj menciu nian kont-kodon ATEO-Y. Sciigu ankaŭ la Sekretarion-Kasiston per poŝtkarto. Jen diversaj pagrimedoj:

   a. al nederlanda poŝtbankokonto (ĝirkonto) 378964 (Den Haag) de UEA;
   b. per internacia poŝtmandato al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando;
   c. per "eŭroĉeko", sur la dorsa flanko de kiu nepre aperu via kartnumero.

Antaŭ ol pagosendo, kontrolu kiom la nederlanda banko deprenas por bankkostoj el ĉiu pago. Se la banko forprenos ekz. 11 gld., plejparto de via pago ne finatingos nin kaj estos malŝparo.

4. **Nepagipovaj landoj kaj homoj:** Ni ne ĝis nun sukcesis aranĝi metodon por monpago. Se ekzistas peranto por via lando, vi povas pagi al tiu. Se vi povas, bonvolu kompensi ATEOn per sendo de taŭga ekvivalento de Esperantaj libroj aŭ gazetoj al Ralph Dumain. Se vi ne povas pagi la novan kotizon, vi rajtas daŭre pagi $8 / 16 gld. Se vi neniom povas pagi, ni tamen sendos ***Ateismon*** senpage al tiuj petantoj. Nepagipovuloj povas helpi ankaŭ per propraj verkoj kaj tradukoj.

SE "P91" APERAS POST VIA NOMO SUR LA ADRESETIKEDO SUR LA KOVERTO EN KIU ĈI TIU NUMERO ALVENIS, NI RICEVIS KAJ REGISTRIS VIAN PAGON POR 1991. SE "P92" APERIS, VI PAGIS POR 1992. ATENTIGU NIN PRI AJNAJ NIAJ ERAROJ.

## NOTO POR REVUOJ KIUJ HAVAS INTERŜANĜ-RILATON KUN NI

Bonvolu sendadi vian revuon/gazeton al Ralph Dumain.

# ENHAVO

MESAĜO DE LA PREZIDANTO . . . . . . . . . . . . 1
SALUTO KAJ PARDONPETO; ESTONTA ELDONADO . . . 1
NIA ORGANIZA ESTONTECO . . . . . . . . . . . . 2
FINANCA STATO . . . . . . . . . . . . . . . . 3
NOVA KOTIZO; PRI LA FORMATO DE LA REVUO . . . 4
PRI LA LORULOT-MANUSKRIPTO; RILATOJ KUN UEA . 5
ESTONTA AGADO . . . . . . . . . . . . . . . . 6

RAPORTOJ PRI LA UNIVERSALA KONGRESO EN NORVEGIO de Cvi Ŝolt & Peter Danning . . . . . . . . . . 7

KUNVENO PRI ATEISMO DUM LA 69-A GERMANA ESPERANTO-KONGRESO EN MUNKENO de Roland Schnell . . . . 11

ATEO RENKONTAS IHEU de Ralph Dumain . . . . . . 12

KONTRAŬ LA DIKTATURO DE ALAHO *el* Deklaracio de la Surrealistoj de Pakistano, tradukis R. Dumain 15

RELIGIO EN TURKIO de Turka Samideano . . . . . . 16

DE STALINISMA AL KATOLIKA DIKTATURO EN POLLANDO de Waldemar Nowakowski . . . . . . . . . . . . . 17

*el* KONTRAŬRELIGIA PROPAGANDO de Leono Trockij . 20

KELKAJ BRULAJ DEMANDOJ: RELIGIO EN HINDUJO de Margaret Bhatty, tradukis Sergio Docal . . . . 22

BIBLIOGRAFIAJ NOVAĴOJ . . . . . . . . . . . . . 31

DEMANDARO .... KAJ LA DIOJ RESTAS SURDAJ KAJ MUTAJ de Luis Serrano Pèrez . . . . . . . . . . . . . 32

NIA DIO ESTAS INTERNA IDEO DE L.L. ZAMENHOF KAJ EKOLOGIO DE V.I. VERNADSKI de Prof-o H. Marinov 33

NOVA HUMANISMO KIACELE? de J. Deker . . . . . . 34

POEMOJ DE WILLIAM AULD . . . . . . . . . . . . 37

OBSKURAJ RADIKOJ DE LA "NOVA EPOKO" de Roland Schnell . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 38

ANTISEMITISMO KAJ ERASMO de Elliot L. Jurist, tradukis R. Dumain . . . . . . . . . . . . . . . 44

PRETER LA KREDA BANALAĴO: DU ANGLALINGVAJ LIBROJ RECENZITAJ de Dan O'Hara, tradukis Peter Danning 49

EL NIA LETERKESTO . . . . . . . . . . . . . . . 50

INTERNACIA ADRESARO . . . . . . . . . . . . . . 56